

EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 6

JUNIO 1967



讀毛主席的話
毛主席的話
毛主席的話
如毛主席的指示

Legu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu la vortojn de
Prezidanto Maŭ kaj agu laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

Lin Biaŭ



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj
lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ

Antaŭparolo al la Dua Prezidanto Maŭ

KAMARADO Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenamplekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninism, kaj levis ĝin al tute nova stadio.

La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. La penso de Maŭ Zedong estas potenca ideologia armilo por oponi imperiismon, potenca ideologia armilo por oponi reviziismon kaj dogmism. La penso de Maŭ Zedong estas la gvidprincipo de ĉiuj laboroj de niaj tuta partio, tuta armeo kaj tuta lando.

Tial, la plej baza tasko de la politik-ideologia laboro de nia partio estas ĉiam alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, armi la cerbon de la tutlanda popolo per la penso de Maŭ Zedong kaj persiste meti ĝin en komandon en ĉiuj laboroj. La vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj intelektuloj devas efektive posedi la penson de Maŭ Zedong; ili ĉiuj devas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn instruojn, agi laŭ liaj instrukcioj kaj esti liaj bonaj batalantoj.

En la lernado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, oni devas studi kun demandoj, studi kaj apliki ilin kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tujajn rezultojn, kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita. Por

efektive posedi la penson de Maŭ Zedong oni devas ripetade studi multajn fundamentajn vidpunktojn de Prezidanto Maŭ, kaj estas plej bone parkere memori, konstante studi kaj apliki kelkajn devizojn. Sur la ĵurnaloj estas necese, en kombino kun la aktualaĵoj, konstante publiki cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ, por ke la legantoj povu ilin studi kaj apliki. La sperto de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de la vastaj popolamasoj en la lastaj jaroj pruvis, ke la elekta studo de cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ kun demandoj estas bona metodo por studi la penson de Maŭ Zedong, kaj povas facile rikolti tujajn rezultojn.

Por helpi la vastajn popolamasojn pli bone studi la penson de Maŭ Zedong, ni kompilis la nunan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Organizante la studon, diversaj institucioj kaj organizaĵoj devas elekti koncernan enhavon en kombino kun la situacio, taskoj kaj la ideologia stato kaj laborstato de la amasoj.

Nun en nia granda patrio aperas nova epoko en kiu la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ekposedas marksism-leninism, la penson de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong fariĝos neelĉerpebla forto kaj senkompare potenca spirita atombombo, post kiam ĝi estas posedita de la vastaj popolamasoj. La grandkvanta eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas rimedo de primara graveco por posedigi la penson de Maŭ Zedong al la vastaj amasoj kaj antaŭenigi la ideo-

Eldono de "Vortoj de Zedong"

LIN BIAŬ



La vastaj komandantaro kaj batalantaro de la Aera Armeo de ĈPLA aktive respondas la alvokon de kamarado Lin Biaŭ pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.

logian revoluciigon de nia popolo. Ni esperas ke ĉiuj kamaradoj serioze kaj diligente studos, levos tra la tuta lando novan alttajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj sub la granda ruĝa standardo de la

penso de Maŭ Zedong luktos por konstrui nian landon en grandan socialisman landon kun moderna agrikulturo, moderna industrio, moderna scienco kaj kulturo kaj moderna nacidefendo!

(16 decembro 1966)

Studi kaj Apliki la Vortojn de Prezidanto Maŭ

ĈIU VORTO DE PREZIDANTO MAŬ TRAFA TUŜAS LA KORON DE NI PAŜTISTOJ

Kun la profunda klasa sento de senlimaj amo, kredo kaj adoro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la paŝta popolo de la Ŝamaj-komunumo en la orienta Uĝumĉin-flago, Interna Mongolio, prenas lernadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la unuan vivbezoonon.

En ĉiu el la mongolaj tendoj de la tuta komunumo troviĝas la portreto kaj verkaro de Prezidanto Maŭ kaj la ruĝaj libretoj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ĉiu paŝta grupo havas sian studgrupon por la verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj ĉiu produkta brigado sian helpgrupon por la studo. Dum la hela tago, oni povas vidi, sur la vasta stepo, ke ĉiu el la paŝtistoj tenas en ambaŭ manoj ruĝkovrilan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj absorbiĝas per la lernado; en la vespero, voĉlegado kaj diskutado de la verkoj de Prezidanto Maŭ estas aŭdeblaj el la tenda loĝejo. Paŝtisto Uranĉimeg diris: “Ĉiu vorto de nia amata Prezidanto Maŭ trafe tuŝas la koron de ni malriĉaj paŝtistoj. Ju pli ni aŭskultas liajn vortojn, des pli klara estas nia menso kaj granda nia energio.”

Inter la vintro de 1965 kaj la printempo de 1966, la komunumon trafis sinsekvo da ŝtormneĝoj; en la somero, ĝin trafis la longdaŭra sekegeco kaj brutaj malsanoj. Fronte al la katastrofoj, la paŝtistoj de ĉiu brigado ripete studis la citaĵojn de Prezidanto Maŭ: “Alfronte malfacilojn, niaj kamaradoj devas vidi niajn atingajojn kaj lumon kaj levi nian kuraĝon.” kaj “Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.”

Estas tiuj instruoj, kiuj multe pli fortigis la memfidon kaj firmvolon de la komunumanoj por venki la katastrofojn. Foje en ŝtormneĝo, paŝtisto Paltar perdis la vojon dum paŝtado. Tiam li sentis froston, lacon kaj malsaton. Ekpensante pri la instruo de Prezidanto Maŭ “En kiuj ajn malfacilaj kaj suferigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu homo, li batalos plu”, li tuj revigliĝis kaj ĉe ĉiu kuro sekvis la ŝafaron. Poste, sekvis ankaŭ lia edzino, la paro luktis du tagojn kaj unu nokton en ŝtormneĝo kurante tuj post la grego kaj fine certigis neniun perdon al la kolektivo.

UNU CITAĴO, UNU “MOBILIZORDONO”

Ĉe ĉiu batalpozicio de la militŝipo “Tigro sur Maro”, kiu faris meritojn iam en maroperacio, troviĝas tabuloj kun vortoj de Prezidanto Maŭ zorge ellaboritaj de marsoldatoj kaj en ĉiu maŝinejo surskriboj de citaĵoj, kiujn ili mem desegnis. Ili diris: “Ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ ja estas vero nerefutebla; unu citaĵo lia estas unu mobilizordono; lerninte ĝin en furiozaj ventego kaj ondegoj, ĉian malfacilon ni venkos; lerninte en pluvo de kugloj, ĉian malamikon ni frakasos.”

Iun tagmezon, furiozis ventego kaj ondegoj sur la maro, multaj rifuĝintaj fiŝboatoj ankris ĉe la ankradejo de Ĉongvu-a Fiŝejo ĉe Fugian-fronto, kie restis atendante ordonon por agado ankaŭ tiu militŝipo “Tigro sur Maro”. Subite, batalanto ĉe observado trovis, ke unu grandtipa fiŝŝipo deankriĝis kaj estas forblovata de ventego en la direkto al la ekstera maro. En tiu regiono estas multaj rifoj kaj altaj la ondoj, kaj tiun ĉi fiŝŝipon trafos ĉiam ajn la danĝero de disrompiĝo kaj pereado de homoj.

Senprokraste la “Tigro sur Maro” ekveturis kaj postkuris ĝin al la ekstera maro. Jam proksimiĝante al la fiŝsipo, la militŝipo ne povis alkroĉi sin al ĝi pro la furiozantaj ventego kaj ondegoj. Kion fari? Ĉu oni povas apudstare lasi la vivon kaj proprajon de la popolo suferi la damaĝon?

Tiutempe, iu kanonsoldato surpaŝis la kirasureton, kaj tie li laŭtlegis al ĉiuj la vortojn de Prezidanto Maŭ: “**Nia Komunista Partio kaj**

la Okavoja kaj Nova Kvara Armeoj de ĝi gvidataj estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.”

Jen akuta demando estis elmetata antaŭ ĉiu marsoldato: Ĉu la minaca situacio povos ŝanceli nian decidon labori ekskluzive kaj senrezerve por la interesoj de la popolo? Ne! La batalantoj elmetis peton unuanime: “Alnaĝu por kablotreni la fiŝsipon!”

En Jilong-gubernio de Siĉuan-provinco — la naskiĝloko de kamarado Ĝang Side, la popolanoj gravuras ruĝkolorajn vortojn de Prezidanto Maŭ sur la roko, kie la Ruĝa Armeo siatempe gravuris revolucionan sloganon.



Kian riskon oni devos renkonti por atingi la flosantan fiŝŝipon en la distanco de kelkdeko da metroj en tiom teruraj ondegoj! La eska-droestro hezitis. Fine post petegado de la batalantoj li donis konsenton al du marsolda-toj, kiuj plej lertis en naĝado.

Sin turnante, tiuj du ĵetis en la maron kaj naĝis plenforte kontraŭ la ondegoj al la fiŝŝi-po. Post luktado dum kelkdek minutoj, ili ambaŭ sukcesis suriri la fiŝŝipon kaj per kablo ĝin alligi al sia ŝipo. Ili trovis neniun en la tuta ŝipo post serĉado, ĉar la fiŝistoj ĉiuj sur-bordiĝis post ĝia ankrado.

En la profunda nokto, trenante la fiŝŝipon la militŝipo "Tigro Sur Maro" triumfe returnveturis kontraŭ ventego kaj ondegoj. Post la streĉa batalo, kvankam lacegaj, la mar-soldatoj gravuris en la koro la instruon de Pre-zidanto Maŭ pri la ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo, neniue ili ripozis sed ĉiuj meminitative laboris kun sitejoj kaj laviloj por purigi la fiŝŝipon en ĉiuj holdoj kiuj estis malordigitaj de la vento kaj ondoj. Post ilia penado la holdoj fariĝis puraj kaj en ordo.

INSTRUOJ DE PREZIDANTO MAŬ TRANSDONIĜAS DE GENERACIO AL GENERACIO

Por vere efektiviĝi tion ke oni ne lasu la libron de Prezidanto Maŭ for de la manoj, nek la agon for de la direkto montrita de li, nek ĉiun aferon for de la penso de Maŭ Zedong, la popolo en norda Siĉuan-provinco elpensis bonan metodon: gravuri sur roko la vortojn de Prezidanto Maŭ tiel, ke oni povas ne nur vidi liajn instruojn, sed ankaŭ konservi ilin en eterneco por ke generacio post generacio estu edukata en la penso de Maŭ Zedong.

Kiom feliĉe estas, ke iuj maljunaj vilaĝaj ŝtonhakistoj, kiuj en la malnova socio travivis mizerojn kaj suferojn, nun propramane gra-vuris la instruojn de nia granda gvidanto Pre-zidanto Maŭ, la veron por la mizeruloj kaj suferantoj de la tuta mondo luktantaj por sia liberiĝo! Ili gravuris la vortojn de Prezidanto Maŭ sur rokoj, kaj ankaŭ en siaj koroj. Nun, estas videble ke ĉie sur rokoj de montoj en norda Siĉuan ore brilas la vortoj de Prezi-danto Maŭ.

Sur iu klifo ĉe Gialing-rivero estas gravuritaj la jenaj ideografiaĵoj en ruĝo:

*Estu lojalaj eterne al Prezidanto Maŭ!
Estu lojalaj eterne al la penso de Maŭ
Zedong!*

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Tio estas la korvoĉo de popolo en norda Siĉuan.

Sur alia okulfrapa montokresto oni gravuris sur kolosa tabula ŝtono grandajn vortojn: "**Sen la malriĉaj kamparanoj, ne estus revolucio**". Kaj plie, sur iu alta deklivo estas dek sep ŝtonegoj sur kiuj la komunumanoj gravuris la jenon: "**Faru firman decidon, timu neniun oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**" en dek sep ĉinaj ideografiaĵoj, kiujn oni povas vidi de tre malproksime. Sur multaj ŝtonaj tabuloj de gravuritaj citaĵoj komunumanoj pentris per ruĝa, flava kaj blanka lakoj delika-tajn borderojn de artaj desegnoj; troviĝas ankaŭ tiaj artaj borderoj kiujn oni rekte gravuris sur la ŝtontabuloj de la citaĵoj. La *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas la direktivo por ĉiuj laboroj de la tuta Partio kaj la tuta lando, plej valora klasikaĵo por esti transdonata de generacio al generacio!

Revoluciaj Proverboj


- ☆ Kiel pluvon ŝategas la soifantaj plantoj, la verkojn de Prezidanto Maŭ tiel amas la batalantoj.
- ☆ Sufiĉa pluvo printempa la plantidojn prosperigas, sufiĉa lerno de Maŭ-verkoj la koron lumigas.
- ☆ Sen akvo la fiŝoj ne povas sin vivteni, sen lerno de Maŭ-verkoj la batalantoj ne povas revolucion entrepreni.
- ☆ Neniu homo povas levi tun-kvaronon, sed per la penso de Maŭ Zedong oni povas renversi la mondon.
- ☆ La verkaro de Prezidanto Maŭ radias ore brila, same kiel ruĝa suno eterne sensu-bira.

Revolucia Popolo Ŝatas la Trezoran Libron

LA ruĝe brilanta libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas la revolucia trezoro plej ŝatata ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de la revolucia popolo de la mondo. La revoluciaj popolanoj de diversaj landoj de la mondo sopiras al *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiel plantaĵoj al pluvo dum

sekego. Ĉiuj, kiuj akiris tiun ruĝkovrilan trezoran libron, sentas pro tio feliĉon kaj fieron. Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ sur ĝia frontispico, iuj el ili laŭte kriis ripetade: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Post studado de tiu trezora libro, oni eldiris siajn opiniojn el profunda konvinkiĝo. Iuj diris, ke

La fame konata heroino de la Vjetnama Popola Armeo Nguyen thi Chiên ĝoje akceptas verkojn de Prezidanto Maŭ.



“*Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas trezoro de vero”, “klasikaĵo por la popolo faranta revolucion” kaj “la plej bona libro por solvi problemojn de la nuna epoko”. Aliaj diris: “Ĉiuj vortoj el la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas vero. Posedo de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* ja signifas por ni posedon de potenca pensa armilo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.” La revoluciaj popolanoj de la mondo rigardas la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kiel orientilon por sia agado. Sube estas kelkaj rakontoj pri la varma ŝato, kiun la revoluciaj popolanoj de la mondo havas por la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*.

LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS ĈIAM NESUBIRANTA SUNO

Iu membro de laborista sindikato de Ravalpindi, la provizora ĉefurbo de Pakistano, tre varme amas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Li ĉiam portas kun si la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun lia amiko donacis al li, kaj ĝin studas ofte.

Ĉiun vesperon li pene studas antaŭ enlitiĝo *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* sub olelampo, kaj por faciligi la memoron, li notis la

plej sencoriĉajn frazojn en sian notlibron. Kiam li renkontas malfacilon en la vivo, li ĉiam turnas sin al la verkoj de Prezidanto Maŭ. Li diris: “Tre riĉenhavaj estas la verkoj de Prezidanto Maŭ, kiuj povas helpi nin koni kaj solvi diversajn problemojn. Kiam ajn mi legas verkon de Prezidanto Maŭ, mi sentas min kuraĝigita kaj pli forta. Ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ multe min inspiras.” Li diris plie: “La penso de Maŭ Zedong estas por ĉiam nesubiranta suno. La verko de Prezidanto Maŭ estas lumturo, kiu lumigas la vojon ne nur por la ĉina popolo, sed ankaŭ por ĉiuj subpremataj popoloj en la mondo. Kaj la popoloj de la tuta mondo fine antaŭenmarŝos laŭ la direkto montrita de Maŭ Zedong.”

LAMPO, KIU LUMIGAS LA REVOLUCIAN VOJON

La popolanoj de Kongolando (B.), kiuj vivas ĉe la rivero Kongo, Afriko, ĉiam sopiras al la granda gvidanto de la monda revolucia popolo, Prezidanto Maŭ, kaj montras sian sinceran kaj varman amon al li kaj lia penso el sia korfundo. Ĉiam, kiam ili akiras verkon de Prezidanto Maŭ, ili gardas ĝin kiel trezoron,

Ŝanja-a filio de la Japana-Ĉina Amika Ligo (ortodoksa) en Tokio studas kune la Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.



En sia batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, milicanoj de Kongolando (B.) studas verkon de Prezidanto Maŭ kaj ĉerpas el ĝi senlimajn saĝon kaj forton.



ĝin legas serioze kaj kunligas ĝin kun kaj aplikas ĝin en siaj laboroj kaj bataloj. Grupo da junuloj de la dekkvina filio de la Tutlanda Revolucia Movado de Kongolando (B.) regule kunvenas de longa tempo en klasĉambro de iu elementa lernejo de la ĉefurbo por studi kaj pridiskuti verkojn de Prezidanto Maŭ. Antaŭ kelkaj monatoj ili akiris unu ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj ĉiuj saltis de ĝojo. Sed pro nesufiĉo de la libro por multaj personoj, ili do decidis ke ĉiuj kunvenu en tiu klasĉambro, vespere en ĉiu ĵaŭdo, post laboro aŭ lerno, por speciale kopii kaj studi la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Post kopio de unu eldiro el la libro, ili elmetas demandojn kaj faras diskuton pri ili. Tiuj junuloj, kiuj partoprenas la lernadon, diris kun ĝojeksciteco: “Ni varme amas la libreton *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, pro tio ke ĝi estas lampo, kiu lumigas al ni la revolucion vojon, kaj montras al ni la direkton kaj donas al ni forton en la revolucio.” “En *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* troviĝas respondoj al ĉiuj problemoj de la revolucio en la mondo.” “Ni ne nur studos ĝin teorie sed ankaŭ aplikos ĝin praktike, kiel instruas al ni Prezidanto Maŭ.”

ESTAS NECESE POR REVOLUCIULOJ STUDI TIUN LIBRON

Kiam aperis en Tanzanio en orienta Afriko la ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ĝi tuj ricevis varman akcepton de la vasta revolucia amaso. Jen “elstara ruĝa libro skribita de Prezidanto Maŭ!” iuj tanzaniaj amikoj tuj informis siajn amikojn pri tiu bona novaĵo, post akiro de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en anglalingva eldono, por ke la lastaj dividu kun si la ĝojon. Iu zanzibara teknika laboristo diris post legado de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*: “Kvankam malgranda estas la libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, tamen, ĝi estas plenumpleksa resumo pri ĉiuj revoluciaj pensoj en la mondo. Kiu volas esti revoluciulo, tiu devas studi tiun ĉi libron.”


Sur la ĉambropordo de iu kuracejo en Zanzibaro estas algluita slogano en la svahilia lingvo: “Ni devas sekvi la principon de Maŭ Zedong, ĉar la lia estas vera principo de Karl Marks.” Tion faris iu ordinara zanzibara kuracisto. Per tiuj vortoj li esprimas sian senliman estimon al la granda gvidanto de la monda revolucia popolo Prezidanto Maŭ.

Li ĉiam soife studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*. Li fervore svahiliigis la famajn tezojn de Prezidanto Maŭ ke imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas papertigroj, kaj ke regpotenco venas el pafilo, k. a., por komuniki ilin al siaj amikoj kaj cetere ofte diskutas kun la flegistinoj pri la koncernaj pecoj el *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Li diris: “Prezidanto Maŭ estas la Lenin en la nuna epoko. La tezoj de Prezidanto Maŭ estas tute ĝustaj.”

ĈIUJ VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS FAJROSEMOJ DE REVOLUCIO

La vasta distribuo de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en Japanio multe akcelis la revolucionan batalon de la japana popolo. Antaŭ nelonge, en iu mezlernejo de Tokio aperis multobligita revuo — *Ruĝa Stelo*. Sur la kovrilo estas presitaj la vortoj de Prezidanto Maŭ: “La mondo estas via kaj ankaŭ nia, tamen, ĝi finfine estas via. Vi junuloj, plenaj

La usona popolo sopiras al Prezidanto Maŭ. En la foto du usonaj gejunuloj studas la libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.



de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je la oka aŭ naŭa horo en mateno. La espero estas metita sur vin.” Post la eldono de *Ruĝa Stelo*, la lernantoj konkure ĝin legas, kaj la vortoj de Prezidanto Maŭ ĉiuj kvazaŭ fajrosemoj estigis revolucionan flamon en la koro de tiuj junuloj. Iuj lernantoj diris, ke ili devas, kiel la ĉinaj ruĝaj gvardianoj, zorgi pri la gravaj ŝtataj aferoj kaj la estonteco de la nacio kaj fariĝi bravaj revoluciuloj. Unu el la iniciatintoj de *Ruĝa Stelo* diris, ke la penso de Maŭ Zedong estas akra ideologia armilo por venki imperiismon, reviziismon kaj reakciularon, kaj ke ili mem devas studi ĝin bone, armi per ĝi sian cerbon, kaj ankaŭ zorgi ke ĉiuj kunlernantoj bone studu ĝin. Tial ili decidis eldoni la revuon *Ruĝa Stelo*. Dum sia persista studado de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ili donas apartan atenton al kunligo de la studo kun praktikaj bataloj. Post studado, ili paŝo post paŝo vidis klare la veran vizaĝon de la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj la japana reviziisma kliko, kaj faris firman batalon kontraŭ la “Unio de Japanaj Demokratiaj Junuloj” kontrolata de la reakciaj aŭtoritatuloj de la lernejo kaj la japanaj reviziistoj.

NEPRE STUDU BONE LA PENSON DE MAŬ ZEDONG

Dum ekskurso en iu montregiono de Kubo, kelkaj ĉinaj kamaradoj renkontis maljunan kamparanon. Eksciinte ke ili estas ĉinoj venintaj de Pekino, la kuba maljunulo diris ĝojekscitite: “Bonege, vi estas ĉinaj kamaradoj gvidataj de la granda Prezidanto Maŭ, kiu antaŭenpuŝis la ĉinan historion je kvincent jaroj per unu fojo!” Li eksplikis tuj poste, ke la ĉina Longa Marŝo, la ĉina revolucio, la ĉina konstruado kaj la ĉina nuklea eksperimentado, ĉiuj grandaj venkoj povas esti tiel rapide gajnitaj nur sub la gvidado de Prezidanto Maŭ.

La maljunulo kun emocio diris al la ĉinaj kamaradoj, ke li jam kolektis tridek du aparte eldonitajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Li studas tiujn verkojn, ĉiam kiam li trovas iom da libera tempo. Kiam la maljunulo vidis ke la ĉinaj kamaradoj portas kun si la libreton *Vor-*


toj de Prezidanto Maŭ Zedong en la hispana lingvo, li sincere petis ĝin de ili. Li diris: “Mi jam havas sesdek tri jarojn. Mi partoprenis en kelkajn revoluciajn movadojn en la kuba historio, kaj mi legis verkojn de Prezidanto Maŭ. El miaj personaj spertoj mi sentas ke Prezidanto Maŭ estas la gvidanto de la monda popolo.” Je adiaŭo, la maljunulo, alte levante la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, entuziasme diris al la ĉinoj: “Kamaradoj, estu certaj ke mi nepre studos bone tiun ĉi libron!”



La malia popolo ŝatas studi verkojn de Prezidanto Maŭ. En la foto du maliaj kamplaboristoj studas la libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

LA PENSO DE MAŬ ZEDONG GVIDAS NIN AL Batalo


Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong en la angla kaj franca lingvoj ricevis varman bonvenigon ankaŭ en Anglio kaj Francio respektive. Oni intime nomas ĝin “ruĝa libreto”. Post ricevo de ekzemplero de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, iu angla amiko diris kun ĝojo: “La ruĝa libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* certe influos profunde la popolojn en diversaj anguloj de la mondo en ilia revolucia konscio kaj spirita fizionomio, same kiel en Ĉinio.”



La gvineaj laboristoj kune studas verkon de Prezidanto Maŭ en sia konstruejo.

En Lille de Francio, ses malnovaj laboristaj partianoj eksiĝintaj el FKP, esprimis kun ĝojeksciteco kaj seriozeco, post kiam ilia reprezentanto akiris en Parizo ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ke ĝi estas por ili armilo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo kaj plej granda subteno, kaj ke posedante la penson de Maŭ Zedong, ili povos plibone batali. Ricevinte ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun lia amiko sendis al li kaj lia

edzino, iu franca instruisto de elementa lernejo skribis responde: “Ni ricevis tiun ĉi libron kun granda emocio. Ĝia valoro estas precipe alta, ĉar ni rigardas Prezidanton Maŭ kiel la Lenin de nia epoko Tiu libro estas la trezoro de ĉiu ruĝa gvardiano de la popola Ĉinio, ni do por ĉiam serioze ĝin legos kaj aplikos la senkompare valorajn instruojn donitajn en la libro.”



La du vjetnamaj junulinoj akiris la longde deziratajn revoluciajn trezorajn librojn.

LA distribuado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en eksterlando tradukitaj en diversaj lingvoj fariĝis sensacia politika evento en la mondo kaj vekis fortan eĥon inter la revoluciaj popoloj de la kvin kontinentoj. La *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estis meminitate tradukita kaj eldonita en multaj landoj kaj ricevas varman akcepton ĉe la vasta legantaro.

En Japanio

En la 16-a de marto, la “tri malnovaj artikoloj” de Prezidanto Maŭ estis publikigitaj japanlingve en unu libro de la Ĉina Librejo en Tokio, kaj estis varme bonvenigitaj de la revolucia popolo de Japanio.

Laboristoj, studentoj kaj oficistoj konkure aĉetis tiun ĉi libron. Iuj legantoj aĉetis unufoje pli ol dudek ekzemplerojn. Ili rigardas ilin kiel plej valorajn donacojn kaj donas ilin al siaj parencoj kaj amikoj.

M. Sakai, japana esperantisto, diris: “La ‘tri malnovaj artikoloj’ estas potenca armilo por remuldi ideologion. Nur kiam oni kreive studas kaj

Trezoraj Libroj Grandnombre Disvendataj tra la Tuta Mondo

kreive aplikas la ‘tri malnovajn artikolojn’ kaj detruas egoismon kaj starigas kolektivismon, oni povas vere posedi la nevenkeblan penson de Maŭ Zedong.”

Iu socia agantino nomata Kanda Saĉiko diris: “La brilajn verkojn, kiaj la ‘tri malnovaj artikoloj’ oni devas ripetade studi kaj apliki. Kvankam tiuj artikoloj estas mallongaj, tamen ili estas plenaj de vero. Oni devas nepre preni ilin kiel sentencojn por sekvi ilin dum la remuldo de ideologio.”

En Sirio

La arablingva eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estis aperigita en Damasko en la 20-a de marto kaj trovis varmegan bonvenigon de la vasta legantaro.

Antaŭ la aperigo de la libro, multaj legantoj jam iris al la librovendejoj por demandi, kiam ĝi aperos. Parto el ili faris antaŭmendojn por pli frue ricevi tiun ĉi trezoran libron.

Iu el la legantoj nomata Samir diris: “Prezidanto Maŭ estas gvidanto de la subpremataj popoloj de la mondo. Lia penso apartenas ne nur al la ĉina popolo, sed ankaŭ al la popoloj de la mondo.”

En Kongolando

En la 9-a de marto la Popola Librejo en Kongolando (B.) vendis por la unua fojo en la ĉefurbo Brazzaville la trezoran libron de la revoluciaj popoloj de la mondo *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Junuloj kaj milicanoj konkure iris al la librejo por aĉeti ĝin. Pli ol 400 ekzempleroj de tiu ruĝa libro elĉerpigis en la daŭro de tre mallonga tempo.

Komizo de la Popola Librejo diris kun entuziasmo al la raportisto de Hinhua Novajagentejo: "Nia librejo neniam akceptis tiel multajn klientojn kiel hodiaŭ. Ni ne anoncis la alvenon de la ruĝa libro al nia ĉefurbo. Sed la klientoj informigis pri tio kaj amase venis por aĉeti ĝin."

Iu milicano aĉetis tri ekzemplerojn de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Li diris al la raportisto: "Mi retenos unu ekzempleron por mi mem, kaj la aliajn mi donacos al miaj bonaj amikoj. Ni kune studos ĝin, kaj ni aplikos la penson de Maŭ Zedong en nia laboro."

En Belgio

La laboranta popolo de Belgio varmege bonvenigis la disvendiĝon de la franclingva eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en tiu lando.

Anglaj gemaljunuloj elektas por si la plej bezonatajn verkojn de Prezidanto Maŭ kun sento de respekto.



La semajna gazeto *La Voĉo de la Popolo*, organo de la Komunista Partio de Belgio, raportis, ke en la pasinta januaro vendiĝis pli ol tri mil ekzempleroj de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en Belgio.

Aklamante la vastan disvendiĝon de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en Belgio, tiu semajna gazeto diras: "Ĉiutage nombro da novaj legantoj komencas kompreni la fundamentajn karakterizaĵojn de marksism-leninismo." La artikolo plue diras: "Tio estas bona, ke ju pli disvastiĝas la penso de Maŭ Zedong, des pli da forto la popolamasoj havos por batali kontraŭ la ekspluatantoj kaj por akiri socialismon."

En Norvegio

S-ino Ester Bergerud, direktorino de librejo en Oslo, diris lastatempe, ke ekde la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio senĉese kreskas la amo de la norvega popolo al la verkoj de Prezidanto Maŭ. Ŝi diris, ke en la pasinteco ili neniam vendis tiel multe da ekzempleroj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* (norveglingva eldono en kvin volumoj); ĉiutage novaj klientoj venas por aĉeti *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj mendoj pri tiu ruĝa libreto venas amase el diversaj partoj de la lando.


S-ino Bergerud daŭrigis ke estas ĝojige, ke la junuloj treege ŝatas la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj ke en ŝia librejo ĉiam amasiĝas multege da junuloj, kiuj deziras aĉeti *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* aŭ *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*.

En Pakistano

La unua stoko da *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* importita de iu librejo en Lahore elĉerpigis en la daŭro de du tagoj. Komizo de tiu librejo diris, ke estas ankoraŭ multaj, kiuj deziras akiri tiun libron, kaj ke multaj laboruloj, kiuj ne scipovas anglan lingvon, postulas aperigi la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en urdulingvo.

Iu amiko en Lahore diris: "Ĉiufoje, kiam mi citis tekstojn el *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* dum diskutado pri iu demando, miaj kolegoj aŭskultis min kun plena atento, montrante envion kaj deziron legi tiun trezoran libron."

Li diris: "La penso de Maŭ Zedong vere estas granda spirita riĉaĵo komuna por ĉiuj progresemaj popoloj de la mondo. La penso de Maŭ Zedong estas la kaŭzo de la brilaj atingoj de la ĉina popolo. La penso de Maŭ Zedong fariĝas nun orientilo por la batalo de ĉiuj revoluciaj popoloj de la mondo."



Kun senlima respekto la polaj popolanoj rigardas la lanfadene broditan bildon "Antaŭvespero de la Decida Batalo", en kiu montriĝas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Pola kaj Rumana Popoloj Arde Amas Prezidanton Maŭ

HIANG JANG

VASTAJ popolamasoj de Pollando kaj Rumanio ofte patose laŭdas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, kun senlima adoro kaj forta emocio kaj per plej belaj kaj noblaj vortoj.

Dum la Ekspozicio de Ĉina Brodarto, kiu okazis en Varsovio kaj la antikva kultura urbo Krakovo de Pollando, respektive je la 17-a de novembro ĝis la 6-a de decembro, 1966 kaj je la 7-a ĝis la 29-a de januaro, 1967, la lanfadene brodita bildo "Antaŭvespero de la Decida Batalo", kiu prezentas la grandan figuron de Prezidanto Maŭ, la sammaniere faritaj bildo "Prezidanto Maŭ Kunestas kun Diversnaciaj Popolanoj" kaj imitaĵo de manskribaĵo de Prezidanto Maŭ "Sur-

skribo por la Foto de Kamarado Li Gin pri la Feo-kaverno de Luŝan-monto" altiris al si grandajn amasojn da rigardantoj en ĉiu tago. Iu varsoviano longe pririgardis, kun levita kapo, la portreton de Prezidanto Maŭ kaj diris emocie: "Mi estas studenta verkojn de Prezidanto Maŭ. Kiam mi vidas la portreton de Prezidanto Maŭ, mi tuj eksentas ardan amon en la koro. Prezidanto Maŭ estas granda gvidanto." Li kantis antaŭ la spektantoj *Ruĝas la Oriento* en la pola lingvo. Dum rigardado, multaj el la vizitantoj libere elverŝis, en siaj paroloj al aliaj, sian senliman adoron al Prezidanto Maŭ. La broda imitaĵo de la "Surskribo por la Foto de Kamarado



Rumana studentino legas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong kune kun ĉina studentino en Rumanio.

Li Ĝin pri la Feo-kaverno de Luŝan-monto", poemo verkita kaj manskribita de Prezidanto Maŭ, altiris al si la atenton de iu pola instruisto:

*Fortikaj pinoj staras en krepusko de vespero,
Trankvilas ili, dum tumulte flugas nuboj tra l' ĉielo.
Naturo kreis artoplene la Feo-kavernon,
Senfinaj beloj sorĉas sur montpintoj de danĝero.*

Ĝin leginte la instruisto diris: "La poemo estas tre impona kaj manifestas vastan animon de granda revoluciisto. Prezidanto Maŭ estas ne nur granda gvidanto, sed ankaŭ granda poeto." Rigardinte broditan bildon kun la titolo "Fonto", iu maljunulino diris kortuŝite: "Kiel profunda estas la penso en la bildo! La batalanto de la Liberiga Armeo legas verkon de Prezidanto Maŭ, sidante apud fonto. La fonto estas natura fonto, kaj la verko de Maŭ Zedong en liaj manoj simbolas fonton de saĝo kaj forto."

Ĉiutage dum la ekspozicio, grandaj amasoj petis ĉinajn kamaradojn, ke ili skribu por ili vortojn aŭ poemojn de Prezidanto Maŭ sur iliajn notlibretojn aŭ poŝtkartojn de Ĉinio. Iuj petis, ke oni prezentu al ili la enhavon de la brila artikolo de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj aliaj petis, ke oni skribu en ĉinaj ideografiaĵoj la sloganojn "Vivu Prezidanto Maŭ!" kaj "Vivu la granda kultura revolucio de Ĉinio!" Nemalmultaj scipovis reciti poemojn kaj ofte citatajn vortojn de Prezidanto Maŭ. Multaj sentis plej grandan honoron en ricevo de portreto de Prezidanto Maŭ aŭ insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj diris, ke ili konservos ilin kiel valoregajn memoraĵojn dum sia tuta vivo.

Kiam ĉinaj junaj tablotenisistoj faris amikan viziton al Rumanio laŭ invito, ili renkontis tie, kien ajn ili alvenis, multajn rumanojn, kiuj petis de ili, kun adoro al Prezidanto Maŭ, portreton de Prezidanto Maŭ aŭ insignon kun portreto de

Prezidanto Maŭ kaj la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Multaj deziris interparoli kun la ĉinaj sportistoj, sed pro lingva baro, ili diris nur "Maŭ Zedong! Maŭ Zedong!" frapante sian bruston, por montri sian ardan amon al Prezidanto Maŭ. Iu studento de agronomio diris al ĉina amiko: "La penso de Maŭ Zedong estas tre korekta. La disvolviĝo de la monda situacio neniam transpasis la antaŭvidon de Prezidanto Maŭ Zedong." Iu laboranto pri korpokulturo diris: "La Komunista Partio de Ĉinio alte tenas la marksism-leninisman standardon, dum Sovetunio jam ŝanĝis sian koloron." Kaj ankaŭ iu ŝoforo diris kun alta estimo: "Ni, la rumana popolo tre amas kamaradon Maŭ Zedong."

Polaj gestudentoj kaj sciencaj laborantoj elektas por si verkojn de Prezidanto Maŭ.



Fremdlandaj Amikoj Varme Laŭdas la Ĉinajn Ruĝajn Gvardianojn

Prezidanto Maŭ diris: “La mondo estas via kaj ankaŭ nia, tamen, en la finanalizo, ĝi estas via. Vi junuloj, plenaj de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je oka aŭ naŭa horo en la mateno. La espero estas metita sur vin.”

EN la ŝtormo kaj pluvego de la mondska granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, la ĉinaj revoluciaj junuloj, nutrataj per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, iniciatis la movadon de ruĝa gardio, kiu estas glorata kiel granda iniciato en la internacia komunisma movado. Tiu novnaskitaĵo kun potenca vivforto ricevis intiman prizorgon kaj varman kuraĝigon de Prezidanto Maŭ tuj post sia apero sur la horizonto de la oriento. Prezidanto Maŭ diris al la ruĝaj gvardianoj: “**Mi firme subtenas vin!**” Ekde tiam, daŭre disvolviĝas kaj plifortiĝas la vicoj de ruĝa gardio kaj fariĝis granda armeo de la kultura revolucio.

MONDSKUA AGADO REVOLUCIA

Tuj post sia apero, la ruĝaj gvardianoj gajnis varman laŭdon de la tutmonda popolo per sia sentima revolucia spirito kaj mondska revolucia agado. La jaro 1966, en kiu la ruĝaj gvardianoj suriris la revolucion scenejon, estas nomata de la tutmonda revolucia popolo “jaro de ruĝa gardio”. La naskiĝo de tiu “plej novtipa revolucia junulara organizaĵo en la homa historio” kaj ĝia revolucia agado fariĝis unu el la plej gravaj aferoj en la

mondo. Ĉiuj revoluciuloj de la mondo esprimas sian aktivan kaj firman subtenon al la ruĝaj gvardianoj kaj plej varme akklamas la ĉinajn revoluciajn sturmantojn kiel bonegajn. Progresemaĵoj ĵurnaloj aŭ gazetoj de iuj landoj publikigis ĉefartikolojn aŭ verkojn sub la titolo “Vivu la Ruĝa Gardio” por hurai la naskiĝon de la ruĝa gardio aŭ aperigis specialajn artikolkolektojn pri la ruĝa gardio por raportoj ĝiajn revoluciajn farojn. Prenante *Ruĝan Gvardion* kiel titolon la italaj kaj francaj revoluciaj junuloj eldonas gazeton aŭ ĵurnalon por propagandi la veron de revolucio kaj disvolvi la revolucionan ribelan spiriton. Junaj studentoj el multaj landoj amase okazigis kunsidojn kaj aperigis murgazetojn kaj esprimis, ke ili volas lerni de “la generacio de novaj homoj, nutrataj de la penso de Maŭ Zedong”. Multaj verkistoj skribis poemojn laŭdantajn “la ruĝajn soldatetojn de Maŭ Zedong” kaj multaj artistoj komponis muzikaĵojn por prikanti “la junajn ruĝajn ribelulojn”. Ĉiulandaj revoluciaj popolanoj rigardas la ruĝajn gvardianojn kiel siajn “plej intimajn batalamikojn”. La laosa verkisto Souvanthon, kiu luktas sur la patriota batalfronto kontraŭ la usona imperiismo, skribis kun pasio la poemon *Al Batalantoj de Ruĝa Gardio* kaj pramane kopiis ĝin en la laosa lingvo sur ruĝa


silka flago, kiun li sendis al la ĉinaj ruĝaj gvardianoj pere de siaj ĉinaj amikoj. Kiam kvin ĉinaj studentoj lernantaj en Hungario estis senkaŭze ordonitaj de la hungara registaro reveni al sia patrolando, iu hungara studento metis en sian sinon kelkajn aparte eldonitajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj iris por adiaŭi ilin evitante la observon de policianoj. En la nomo de hungaraj revoluciaj junuloj li diris kun profunda amikeco al la ĉinaj studentoj: “Transdonu niajn salutojn al la ĉina popolo kaj la ruĝaj gvardianoj kaj diru al ili, ke ni ĉiam staras kun vi ĉe via flanko!” Mohamed Dahan, amiko el “franca” Somalio, diris al ĉinaj ruĝaj gvardianoj: “Ni senrezerve subtenas vian proletan revolucion spiriton sentiman en sturmo kaj agado, en revolucio kaj ribelo.”

STURMANTOJ DE REVOLUCIO, TOMBOFOSANTOJ DE IMPERIISMO KAJ REVIZIISMO

Multaj revoluciuloj el diversaj regionoj, diversaj batal-kaj labor-postenoj de la mondo konstante skribis leterojn al la “pioniroj de la revoluciuloj en la mondo” por esprimi sian gratulon. La albana popolo, kiu staras kvazaŭ “**altega monto leviĝinta inter nuboj**”, la vjetnamaj batalantoj, kiuj heroe luktas sur la kontraŭsona fronto, la junuloj el la patrolando de Lenin, kiuj decidis batali kon-

traŭ la moderna reviziismo ĝis la fino, kaj la idoj de membroj de la Pariza Komunumo, kiuj troviĝas en nova vekigo, ĉiuj amase sendis batalajn salutojn al ĉinaj ruĝaj gvardianoj. Kandjou, amiko el Sud-okcidenta Afriko, montris, ke “ĉiuj revoluciaj popolanoj de la tuta mondo esprimas estimon al la junaj kaj heroaj ruĝaj gvardianoj de la granda proleta kultura revolucio”. Ĉar “la ĉinaj ruĝaj gvardianoj estas revoluciaj sturmantoj senprecedencaj en la monda historio”. Revoluciuloj el multaj landoj cetere montras, ke la ruĝaj gvardianoj estas heredantoj de la glora proleta tradicio de la ĉina ruĝa armeo kaj tombofosantoj de imperiismo kaj reviziismo. La fame konata japano Semin Mijazaki laŭdis la ruĝajn gvardianojn kiel “plej purajn, plej saĝajn, plej konsciajn politike, plej kuraĝajn kaj plej revoluciajn junulojn, kiuj sin armis per la penso de Maŭ Zedong”. Iu birma amiko laŭde nomas la ruĝajn gvardianojn “plej ruĝaj, plej revoluciaj kaj plej proletecaj daŭrigantoj de la revolucio en la historio”. Ĉiulandaj revoluciuloj senlime admiras la ĉinajn ruĝajn gvardianojn pro tio, ke ili havas “firman starpunkton” kaj staras sub “klara standardo”, ke ili “distingas klare la malamikon disde siaj propraj homoj kaj pravon disde malpravo”, kaj ke ili posedas “grandan spiriton, sufiĉan kuraĝecon, fortan memfidon kaj grandiozan impeton kaj estas rapidaj en

Kamarado Hysni Kapo, membro de la Politika Buroo kaj sekretario de la sekretariejo de CK de la Albana Partio de Laboro, kaj aliaj en la Ekspozicio pri la Kultura Revolucio de Kinghua-Universitato.



agado”, kaj admiras ilin pro tio ke ili “havas fortegan malamon kontraŭ la malamiko kaj profundan amon al la popolo”. Iu pola amiko esprimis sian firman kredon, ke la monda revolucia popolo timas nenion, kun la sagaca gvido de Prezidanto Maŭ kaj revolucia spirito de la ruĝaj gvardianoj.

DEFENDANTOJ DE LA GRANDA PENSO DE MAŬ ZEDONG

Sub la firma subteno kaj strikta kunagado de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la potencaj ĉefaj fortoj de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, la ĉinaj ruĝaj gvardianoj “kreas historion”, “kreas miraklojn” kaj “faras grandajn revoluciajn meritoplenajn heroaĵojn”; la revolucia agado de la ruĝa gvardio estos enskribita por ĉiam en la historion de klasbatalo gvidata de la proletaro. Tio estas la pritakso farita de la monda revolucia popolo al la heroa revolucia agado de la ruĝaj gvardianoj. La itala gazeto *Marksism-Leninisma Junularo* montris: “La batalo de la ruĝaj gvardianoj estas la plej granda kontribuo de la ĉina popolo al la disvolviĝo de la homaro”. Hysni Kapo, membro de la Politika Buroo kaj sekretario de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro laŭdis la ruĝajn gvardianojn, dirante ke ili firme, kuraĝe kaj obstine batalas por gajni la venkon de la granda proleta kultura revolucio, por frakasi dekstrulojn, reviziistojn, imperiistojn, estratajn de Usono, modernajn reviziistojn, kun la sovetia perfida gvidantaro kiel sia centro, kaj ĉiujn aliajn en- kaj ekster-landajn malamikojn, por defendi la marksism-leninisman linion de Prezidanto Maŭ kaj por ke tiu linio gajnu la venkon. La franca ĵurnalo *Nova Humaneco* montris: “Sub la gvido de Maŭ Zedong — la nuntempa Lenin — la ĉinaj ruĝaj gvardianoj forlavas antaŭajn malpuraĵojn, eliminis ĉiujn venenaĵojn postlasitajn de feŭdismo, burĝaro kaj imperiismo, kaj malfermas vojnon de antaŭensaltego por Ĉinio. Ili sperto kaj venko kontribuos al la marksism-leninisma internacia komunisma movado.”

Ĉiulandaj revoluciaj popolanoj varme laŭdas la ĉinajn ruĝajn gvardianojn kiel “milionan bravan armeegon, kiu sentime sturmas al la malnova mondo, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ”, “fidelajn plenumantojn de eliminado de la ‘kvar malnova-oj’ de ekspluataj klasoj kaj starigo de la ‘kvar nova-oj’ de la proletaro”, kaj “detruantojn de la malnova mondo kaj kreantojn de la nova”. En la tago, kiam la pekinaj ruĝaj gvardianoj komencis forbalai la “kvar malnova-ojn” sur stratoj, iu jemenska poeto vizitanta Ĉinion estis profunde tuŝita de la revolucia spirito de la junaj revoluciaj batalantoj kaj kun

neretenebla emocio verkis poemon en la sama tago por prikriti la ruĝan gvardion. Li skribis:

*Ĉinaj junaj batalantoj,
Disĉipletoj de Maŭ Zedong!
Vi defendas ruĝan la morgaŭon,
La aferon de l' Partio glora*

*Kaj la mondon de la laboristoj, kamparanoj
kaj soldatoj de l' Ĉinio Maŭ
Zedong-a en la granda oriento.*

Gvidanto de la Cejlona Komunista Partio Sanmugathan varme laŭdis, ke “la ruĝaj gvardianoj realigis en kelkaj tagoj aŭ kelkaj semajnoj tion, kio ne povis esti efektivigita dum pasintaj dekoj da jaroj”, kaj ke ili kvazaŭ torento “forlavas ĉiujn objektojn kontraŭstarantajn al la revolucio.”

Tutmondaj revoluciuloj plej admiras la ĉinajn ruĝajn gvardianojn, pro tio ke ili varme amas Prezidanton Maŭ kaj senlime fidelas al Prezidanto Maŭ kaj marksism-leninismo. Beqir Balluku, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj kaj ministro de la Nacia Defendo, diris: “Batalantoj de la ruĝa gvardio tre bone kaj strikte plenumas la instrukcion de Prezidanto Maŭ, firme marŝas sur la revolucia vojo de Prezidanto Maŭ kaj defendas la proletan revolucian linion reprezentatan de Prezidanto Maŭ.” Revoluciuloj de multaj landoj montris, ke la ruĝaj gvardianoj “fervore studas, efektivigas, propagandas kaj defendas la penson de Maŭ Zedong”, kaj ke ili tute meritas la nomon de “defendantoj de la granda penso de Maŭ Zedong” kaj “avangardo en propagando de la penso de Maŭ Zedong”. Junulo el iu okcident-afrika lando esprimis, ke li same kiel la ĉinaj ruĝaj gvardianoj ĉiam kunportos kun si la trezoran libreton de revolucio — *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, ĉiam lernos el ĝi, kaj decideme batalos por la liberigo de la patrolando.

LA ESPERO DE LA TUTMONDA REVOLUCIA POPOLO

Tra la hardado en la flamoj de la granda kultura revolucio, la ĉina ruĝa gvardio fariĝis “potenca rezerva armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo” kaj “la Granda Muro en defendo de la ruĝa Ĉinio”. Pro tio ĉiuj revoluciuloj en la mondo sentas en si ĝojon de venko kaj estas plenaj de firma fido je la estonteco de Ĉinio”. Aŭstralia ĵurnalo *Vanguard* montris, ke la ruĝaj gvardianoj “nun klopodas ‘frakasi la egoismon kaj starigi kolektivismon’ en si” por “transformi sin en perfektajn homojn”. Iu japana progresema amiko laŭdis, ke la ruĝaj gvardianoj decidis hardi sin en la flamoj de la granda kultura revolucio por fariĝi plej fidindaj

daŭrigantoj, kiuj timas nek penadon, nek morton, kaj pretas tutkore kaj plenanime servi al la revolucio kaj la popolo. Iu birma junulo firme kredas, ke kun ruĝaj gvardianoj, kiuj kuraĝas sturmi kaj revolucii, “la proleta reĝimo de Ĉinio restos por ĉiam ŝtate fortika.” Iu tanzania amiko diris: “La ruĝa gvardio deklaris al la tuta mondo, ke la oriento nepre devas konservi sian ruĝan koloron!” Du sudokcident-afrikaj revoluciuloj esprimis sian firman kredon: “Pro tio, ke la ĉinaj junuloj aŭskultas la instruojn de Prezidanto Maŭ, agas laŭ lia instrukcio kaj prenas la Popolan Liberigan Armeon kiel sian modelon, Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron.” Ankaŭ revoluciuloj de iuj landoj montris: “La ĉinaj ruĝaj gvardianoj certe transdonos la stafetan bastoneton de revolucio de generacio al generacio, kaj por ĉiam alte tenos la standardon de la proleta monderevolucio”.

Tutmondaj revoluciuloj rigardas la ĉinan ruĝan gvardion kiel “la esperon de la monda revolucia popolo”. Ili diris, ke la ĉina ruĝa gvardio “estas la plej ruĝa, plej revolucia freŝa forto por antaŭenpuŝi la mondan revolucion” kaj estas “proleta internaciisma avangardo”. Iu urugvaja amiko el kultura rondo diris: “La ĉinaj ruĝaj gvardianoj estas sturmantoj ne nur de la ĉina revolucio sed ankaŭ de la monda revolucio”. Iu usona amiko montris, ke la ruĝaj gvardianoj “tenas en sia koro kaj la ĉinan revolucion kaj la tutmondan revolucion. La kriterioj, kiujn ili havas en la koro por distingi pravon disde malpravo, estas la penso de Maŭ Zedong, la interesoj de la proletaro kaj la interesoj de la ĉina revolucio kaj la tutmonda revolucio.”

Reprezentanto de la Kongreso de Azaniaj Panafrikistoj montris ke “la ruĝaj gvardianoj nun plenumas mision kun internaciisma signifo”, kaj ke ili “estas fortaj batalantoj kontraŭ la internacia imperiismo kaj firmaj subtenantoj de la batalo de subpremataj popoloj”.

LA SPIRITO DE REVOLUCIA RIBELO KURAĜIGAS ĈIULAN- DAJN JUNULOJN

La ĉinaj ruĝaj gvardianoj starigis “senprecedencan brilajn ekzemplon” por la revoluciaj ju-

nuloj de la mondo. Revoluciuloj el multaj landoj diris, ke “la revolucia spirito de la ruĝa gvardio forte kuraĝigas la revoluciajn junulojn de la tuta mondo” kaj “por ĉiam kuraĝigos la batalantajn junulojn de la mondo marŝi antaŭen.” Ankaŭ revoluciaj junuloj el multaj landoj esprimis, ke “ili devas lerni kun estimo de la ruĝa gvardio” kaj “antaŭen marŝos, sekvante la ruĝan gvardion”. Iu japana mezlernejo diris: “La aĝo de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj estas proksimuma al la nia, tamen ili timas nek la ĉielon nek la teron kaj faras grandan aferon. Ni admiras ilin kaj devas lerni de ili.” Parto da revoluciaj junuloj de Sovetunio, kiu estas nun sub la regado de la moderna reviziisma kliko, decidis disvolvi la spiriton de la ĉina ruĝa gvardio por “levi la revolucionan torĉon de Lenin”. Nun, iuj progresemaj junuloj el diversaj kontinentoj de la mondo jam titolis sian rondon per “ruĝa gvardio”. Brazila amiko Jayme Marthins diris trafe: “Por kompari kun la centmilionoj da novaj herooj armitaj per la penso de Maŭ Zedong, kiuj aperos en la mondo, la steloj sur la firmamento montriĝos tro malmultnombraj. Tiuj novtipaj herooj brilos por ĉiam kiel la steloj en la ruĝa kosmo de la proletaro”.

Sub la kuraĝigo de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio kaj la revolucia ribela spirito de la ĉinaj ruĝaj gvardianoj kaj la sennombraj aliaj revoluciaj amasoj, certe aperos en la flamoj de la monda revolucio arego da junaj revoluciaj sturmantoj, kiuj kuraĝos sentime pensi, paroli, agi kaj ribeli, kaj ruĝa mondo certe naskiĝos en la ŝtormego de la monda revolucio!

La japana popolo varme bonvenigas la artistajn batalantojn armitajn per la penso de Maŭ Zedong.



Vizito al la Flava Rivero dum Neĝado

POST la batalo ĉe Ĝiluogen, la Unua Korpuso de la Ruĝa Armeo loĝis proksime de la urbeto Ganguji, Janĉuan-gubernio por ripozo kaj reordigo. Iutage en la meza tagdeko de decembro, staboĉefo Zuo Kjuan de la korpuso venigis min al si kaj ordonis, ke mi eskortu, kun pistola subplotono de la Kavaleria Rekognoska Roto sub mia gvido, korpusestron Lin Biaŭ al Vajaŭpu por partopreni kunvenon de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ. Sciiginte al mi la taskon, la staboĉefo aldonis: “Memoru, ke vi kunportu mapojn pri la regiono de Kinggian, Janĉuan kaj Janĉang, kiam vi foriros.”

Aŭdinte la lastajn vortojn de la staboĉefo, mi sentis ĝojon en la koro pretervole. Miaj spertoj akiritaj dum laborado en la stabejo de la korpuso konigis al mi, ke la komandado de kamarado korpusestro Lin karakteriziĝas per seriozeco kaj atentemo pri la detaloj. Dum krizaj momentoj en batalo, li ĉiam eliras persone zorgi pri la direktado; kaj antaŭ batalo, li donas apartan atenton pri persona esplorado kaj studo fare de komandanto pri la efektivaj kondiĉoj. Li ofte postulas, ke ĉiu komandanto havu diligentajn piedojn, t. e. multe iri kaj rigardi sen timo de laco, kaj havu diligentan buŝon, t. e. multe pridemandi kaj esplori kaj ne senti ĝenon en tio. Kaj li mem agis ĝuste

tiamaniere. Ĉiufoje, kiam li venis al nova garnizonejo, li senescepte ĉirkaŭrigardis pri ĝi kaj faris interparolojn kun lokaj popolanoj. Ofte okazis, ke certaj informoj pri la malamiko, pri la topografio kaj popolaj kutimoj kaj moroj jam estis delonge akiritaj de li, antaŭ ol ni, profesiaj rekognoskantoj ilin sciis; kaj li ofte surprizis nin per intermetoj dum niaj raportoj, korektante aŭ kompletigante niajn informojn, por jam ne paroli pri la gravaj paŝoj. Antaŭ nelonge, dum la batalo ĉe Ĝiluogen, mi sekvis lin fari rekognoskan esploron ĉe la loko. Ĉifoje irante kunveni, ni devas kunporti tiom multe da mapoj, sendube nova paŝo estas farota.

Kaj efektive tiel okazis. En tiu kunveno, la Centra Komitato de la Partio fiksas la politikojn unuiĝi kun ĉiuj patriotaj popolanoj, fondi nacidefendan registaron kaj unuiĝintan armeon kontraŭjapanan, kaj formi kontraŭjapanan nacian unuecfronton por rezisti la invadon de la japanaj banditoj kaj savi la patrion el perea danĝero. Por mobilizi la tutan popolon al armita rezistado kontraŭ Japanio kaj frakasi la “ĉirkaŭekstermon” de la reakciuloj, la Centra Komitato de la Partio decidis reorganizi la Ruĝan Armeon de la norda Ŝenhi en Kontraŭjapanan Avangardan Armeon de la ĉina popolo, por ke la armeo transpasu

la Flavan Riveron en la oriento, sin preparu marŝi al la fronto en Hebej kaj Ĉahar kaj batalu kiel avangardo de la tuta popolo en rezistado kontraŭ la japana invado.

Kompreneble, pri tio mi informiĝis nur poste. Tiutempe, post la kunveno ĉe Vajaŭpu, la korpusestro kamarado Lin Biaŭ klarigis al mi nur la jenan konkretan taskon: iri al la ĉirkaŭaĵoj de Kinggian kaj Janĉang por esplori la topografion de la ambaŭ bordoj de la Flava Rivero.

Nia grupo el dekelkaj personoj ekiris rajdante sur ĉevaloj al Hekoŭ de Kinggian-gubernio. En la unua tago, ni rajdis pli ol cent liojn (lio = 0.5 kilometro) kaj atingis sidejon de distrikta soveta registaro. Ni faris geografian enketon pri la loko al funkciuloj en la registaro. La korpusestro aparte postulis de ili lokan mapon de la gubernio. Ankaŭ tio estis lia kutimo. Li ŝatis rigardi samtempe lokajn mapojn de gubernioj kaj militajn mapojn ilin komparante, ĉar la lokaj mapoj estas pli detalaj kaj ĝustaj. Vespere de la sekvinta tago, ni venis, spite neĝadon, al la ĉirkaŭaĵo de Hekoŭ kaj haltis por tranokti en vilaĝeto dekelkajn liojn for de la riverego kaj decidis ekiri al la rivero en la sekvonta tago post matenmanĝo.

Tiunokte, denove neĝadis per floketoj. En tre malfrua horo de la nokto mi kontrolis la gardstaran deĵoron kaj rimarkis, ke ankoraŭ brilas lamplumo en la kaverndomo de la korpusestro. Mi do eniris ĝin senbrue kaj trovis, ke kamarado korpusestro ankoraŭ ne dormis. La briklito estis plene kovrita de kunmetitaj partoj de kvindek milona mapo, kaj sidante ĉe la litfino li rigardadis absorbite la mapon kaj cerbumadis, premfiksante ĝin per ambaŭ manoj. Rimarkinte mian envenon, li demandis min kun rideto: “Kial vi ankoraŭ ne ripozas en tiel malfrua horo? Ĉu ili jam enlitiĝis?” Laŭ lia dirmaniero, tamen estis ni, sed ne li mem, kiuj devis ripozi.

“Ili jam kuŝiĝis,” mi respondis kaj poste petis lian opinion: “La neĝado intensiĝis. Ĉu morgaŭ ni iros al la rivero laŭplane?”

“Jes. Tio ne malhelpos, se ni trovos bonan vojqvidanton.” “Havigu al ni du vojqvidantojn,” li aldonis post ripenso, t. e. “unu ŝafiston

kaj unu ŝipiston. Estus bone, se ili estas iom aĝaj.” Tion dirinte, li denove kliniĝis por daŭrigi sian mapolegadon.

Mi iris al la vilaĝa soveto kaj komisiis al la prezidanto de la vilaĝo, ke li trovu kelkajn kompletojn da civilaj vestoj por nin alivesti kaj du vojqvidantojn. Sed senvole mi venadis al la demando: Unu vojqvidanto jam sufiĉas, ĉar la distanco inter la vilaĝo kaj la rivero estas ne pli ol dekelkaj lioj. Kial necesas du vojqvidantoj? Kaj krome, kial nepre tiaj?

La neĝado daŭris la tutan nokton kaj formis dufutan neĝtavolon sur la tero, kaj ĝi ankoraŭ ne ĉesis. Ja estis sufiĉe malfacile iri en tia vetero al la riverbordo; sed tia vetero favoris al rekognoskado antaŭ la malamiko.

Post la matenmanĝo, venis al ni la du vojqvidantoj, kiujn la vilaĝa prezidanto trovis por ni. Ili ambaŭ havis aĝon de ĉ. 40 jaroj respektive. La ŝafisto estis iom pli aĝa. Ili ambaŭ estis tre fortikaj, kun vizaĝo nigre-ruĝa kaj profundaj sulkoj sur la frunto — evidente simplaj kaj diligentaj laboruloj. Mi kaj kamarado Lu Di, la estro de la Kavaleria Rekognoska Subplotono kune elektis kvin batalantojn kaj alivestis nin per la prunteprenitaj vestoj. Iuj el ni surmetis senŝtofan ŝafpeltan surtuton kaj volvis lavtukon ĉirkaŭ la kapo; aliaj simple turnis eksteren la blankan subŝtofon de siaj vatitaj vestoj. Tiel do ni fariĝis blankaj tutkorpe, ne klare distingeblaj en neĝo je kelkdekaj paŝoj, por ne paroli pri la larĝega distanco de la Flava Rivero. Sia-vice, ankaŭ la korpusestro sin alivestis. Li portis sian malnovan surtuton kun la subŝtofo eksteren turnita kaj sin zonis per ŝnuro.

Kiam ĉio pretiĝis, ni ekmarŝis al la rivero, paŝante en la ĝisgenue profunda neĝo spite al ŝutiĝado de densaj neĝfloketoj. Estis la fino de decembro, kaj la vetero jam fariĝis tre malvarma. La nordorienta vento alblovanta de la Flava Rivero ŝutadis amase neĝfloketojn kontraŭ niajn vizaĝojn kaj en la kolumojn, tiel ke ni tremis de frosto kaj kelkfoje sentis sufokon. Sed nelonge post eliro el la vilaĝo ni kutimiĝis al tio iom post iom, kaj la neĝa pejzaĝo antaŭ niaj okuloj sorĉe altiris la atenton de ni, homoj kiuj longe vivis en suda Ĉinio! Pura neĝo plene kovris ĉion de la tuta

nordokcidenta altebenejo, tiel ke blanka vastaĵo disetendiĝis ĝis nevideble fora limo — kiel impona kaj grandioza belo!

Eble la vojevandantoj rimarkis, ke nia konduto estas iom stranga, kaj nin demandis pro nevenkebla scivolemo: “Kamaradoj, kial vi venas al la rivero en tia neĝvetero?” Mi tuj respondis: “Proverbo ja diras: ‘Ne ĉesos la strebo ĝis alveno al l’ Flava Rivero.’ Ni, suduloj, neniam vidintaj la Flavan Riveron, nur aŭdis, kiel granda ĝi estas kaj kiel flava estas ĝia akvo. Ĉar nun ni venis proksime al ĝi, do ni nepre volas ĝin pririgardi.” Tiun respondon ni antaŭpretigis por eviti malkaŝon de nia intenco. Dum la parolo, mi turnis mian rigardon al la korpusestro kaj vidis, ke li ridante kapjesis. Grandpaŝe kaj nerapide li sin movis sur la profunda neĝo, kaj de tempo al tempo li eklevis sian kapon por ĉirkaŭrigardo kaj iam kaj tiam etendis sian manon por ricevi neĝflokojn. Li montriĝis tiel senzorga, kvazaŭ li vere havus grandan intereson en pririgardo de la riverego kaj admirado pri la neĝa vidaĵo.

Ankoraŭ iom antaŭen irinte, ni ekaŭdis bruadon “bru — bru — plaŭ — plaŭ —”. “Ĉu vi aŭdis?” demandis unu el la vojevandantoj. “Tio estas la Flava Rivero.”

Ĉirkaŭ la deka, ni alvenis la bordon kontraŭ la transpasejo Hinguandu, proksime de Hekoŭ. La neĝado jam ĉesis kaj montriĝis antaŭ ni alia eksterordinara pejzaĝo de la glaciiginta Flava Rivero: flosas malrapide kolosaj glaciaj blokoj, similaj al arĝentaj montetoj; puŝate de ondoj ili forte koliziiĝas disŝprucigante akverojn kaj glacian pulvoron kun kortremigaj bruegoj, ĉe kiuj ekflugas aroj de surprizitaj longbekaj blankaj birdoj, preskaŭ tuŝante la surfacon de la fluo — vere belega vidaĵo.

Nun la ŝafisto alpaŝis, ektiris la veston de la korpusestro kaj diris montrante al la transa prampasejo: “Iom vin gardu, kamarado. Ĉi tie estas limo inter la ruĝa kaj blanka regionoj, kaj troviĝas transrivere blankaj hundaĉoj de Jan Hiŝan, la reakcia militaristo en Ŝanhi-provinco, kaj en serenaj tagoj ili eĉ pafis tien ĉi iam kaj tiam.”

La korpusestro kapjesis kaj tuj ĉirkaŭiris post altaĵon sur la bordo, sin kuŝigis sur la

neĝon kaj komencis esplorigardi per sia levita binoklo. Li rigardis kun tia atentemo, ke tute malaperis lia senzorga mieno dum la ĵusa ĝuado pri la pejzaĝo. Ankaŭ mi tuj elprenis mian binoklon kaj vidis tra ĝi tre klare la trajtojn de la transa bordo: Ambaŭflanke de la prampasejo staras abruptaj krutaĵoj. Sur la montoj kaj ĉe ravinbuŝoj, diŝe staras rondaj neĝamasoj kun nigraj faŭkoj. Ili estas fortikaĵoj. La prampasejo estas eĉ pli bone gardata. Ĉe la densa aro de fortikaĵoj, sin trovas gardstarantoj de la malamiko kaj kelkaj malamikaj soldatoj balaas neĝon.

Pririgardinte por iom da tempo, la korpusestro daŭrigis sian iron al la supra parto de la rivero norde de la prampasejo. Tie la neĝtavolo estis eĉ pli dika, kaj ĉe kelkaj lokoj ĝi englutas la tutan gambon. Sed la korpusestro kvazaŭ tute forgesis la neĝadon. Ŝancelpaŝinte por iom da tempo, li haltis por ĉirkaŭrigardo, kaj poste denove daŭrigis sian iradon.

Irinte sufiĉe longan distancon, li haltis, rigardis la kontraŭan bordon por momento, kaj frapforiginte la neĝflokojn de sur sia basko li ekiris al la ŝafisto. Li levis sian manon kaj desegnis rondon en la aero montrante al la transa bordo, kvazaŭ sen difinita celo, kaj demandis:

“Samlokano, ĉu vi estas suririnta ĉiujn montojn en la ĉirkaŭaĵo?”

“Jes,” respondis la ŝafisto. “En la pasinteco, mi laboris kiel ŝafisto dum 20-30 jaroj por aliaj. Ja kie ne troviĝis miaj piedsignoj, ĉu ĉi tie, ĉu tie transe!”

“Ha, kiel oni povas surgrimpi la rokmuojn, kiuj ja estas tiel krutaj?”

“Sed mi estis ŝafisto. Kien ŝafo povas surgrimpi, tien povas atingi ankaŭ homoj; kaj kien ŝafoj ne povas surgrimpi, tien homoj devas ilin helpi per tiro.” Montrante al la neĝkovritaj breĉoj de la monteĝo, la ŝafisto daŭrigis: “Rigardu, ĉe la riverbranĉaj enfluejoj, la bordoj estas oblikvaj kaj surgrimpeblaj.”

Kamarado korpusestro Lin Biaŭ kapjesis kaj ripetis murmure la vortojn de la ŝafisto: “Jes, kie ŝafoj povas suriri, tie ankaŭ homoj povas suriri.”

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Lumigas Mian Koron

GU ATAŬ

Kamaradino Gu Ataŭ (53-jara) estas malriĉa kamparano, membro de Hongging-brigado, Ŝahikomunumo, gubernio Tajcang de provinco Giangsu. Pro sia senlima amo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj penega studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, ŝi estis nomita aktivulo en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj havis honoron vidi Prezidanton Maŭ en Pekino, 1966.

Kamaradino Gu Ataŭ ne povoscias legi. Por bone rakonti al la vizitantoj, kiuj petas informon pri ŝia studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, ŝi pentrigis dekojn da bildoj kiel memorilon por sia parolado. Ĉiu bildo profunde spegulas parton de ŝia persona travivaĵo, ideologian ŝanĝiĝon aŭ komprenon en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

La Red.

MIA patro mortis, kiam mi estis trijara; kiam mi estis dekdujara, mi perdis ankaŭ patrino kaj fariĝis infanfianĉino.

Poste mi komencis labori en Litaj-a Ŝpinejo. Tie mi suferis ĉian subpremon kaj devis labori dekdu horojn ĉiutage por ricevi

laborpagon de nur 12 cendoj. Dudek tagojn post la naskiĝo de mia unua infano mi jam devis rekomenci laboradon. Post

Aŭskultante ilian interparolon, mi notis la vortojn de la ŝafisto. Krome mi ankaŭ desegnis skizan bildon pri la lokoj montritaj de la ŝafisto, inkluzive de la breĉoj. Tiam mi subite ekmemoris la scenon de la momento, kiam la korpusestro diris al mi, ke mi trovu vojkvidantojn. Ja estas vere, ke en la nordokcidenta regiono multas ŝafistoj, kiuj migras tuttage tra la montaro kaj bone konas ĉiujn valojn kaj angulojn. Ja estas bonege havigi al si tian vojkvidanton por fari ĉelokan esploron. Sendube, ankaŭ la ŝipisto multe nin helpas en enketo pri la fluo.

Krome, la korpusestro interbabilis kun la ŝafisto ankaŭ pri aliaj aferoj, ekzemple pri la herboriĉeco sur la montoj kaj pri la kutima maniero en grimrado de la montoj ĉe la riverbranĉaj buŝoj — ŝajne babiloj bagatelaj, tamen ili klare prezentis la topografion de la transbordaj lokoj, nevideblaj por la okuloj.

Tuj poste, li iris al la ŝipisto, interparolis kun li pri la stato de la Flava Rivero en la antikveco kaj nuntempo kaj poste lin demandis:

“Kiom da tempo oni bezonas por ir-reira remado trans tiel larĝa fluo?”

du sinsekvaj noktdeĵoroj mia infano mortis pro frosto. Mi laboris en la ŝpinoĵo ĝis la aĝo de dudek kvar jaroj. Ĉar vere ne eblis plu vivteni min tie, mi revenis al kamparo.



Terkulturante, mi suferis ankaŭ kruelan ekspluaton de bienulo. La tuta rikolto eĉ ne sufiĉis por kovri la terenton pagendan por farmita tero. En okazo de prunto ĉe uzuristo, mi devis redoni tri litrojn da tritiko por unu litron da senŝeligita rizo pruntprenitan. Por plugi unu muon da tero per bruto de la mastro, mi devis unue transplanti plantidojn por li en du muoj da tero. Sen alia elirejo, mi provis plenumi kamplaboron por la bienulo. Sed la bienulo donis al mi po muo nur 20 litrojn da senŝeligita rizo kiel laborpagon, dum mi devis plenumi la kamplaborojn sur la tero ekde tritikrikolto ĝis rizdraŝo.




Dum printempaj festoj, la bienuloj frandis fiŝojn kaj porkaĵojn, sed mi ne havis eĉ tritikbranon por manĝi.




Kiam la japana imperiismo invadis Ĉinion, kaj la agrezantoj ĉie bruligis, masakris, rabis kaj perfortis virinojn, fariĝis des pli malfacila por ni la vivo.

Fine ni liberiĝis! La grizaj nuboj estis forpelitaj kaj aperis la suno. Dank' al la Partio kaj Prezidanto Maŭ ni malri-



ĉuloj returnis nin el mizero. Post la agrara reformo ni ricevis naŭ muojn da tero. Se ne estus la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ, certe ne estus mi, Gu Ataŭ, hodiaŭ!

En la pasinteco mi ne havis vatitan litkovrilon vintre kaj moskitvualon somere. Post la Li-



berigo la vivo pliboniĝis. Ni ekhavis vatitajn litkovrilojn. Nun ĉiuj niaj vatitaj litkovriloj kaj littukoj estas novaj.

Antaŭe mia familio sinvestis tre ĉifone. Nun ĉiu el ni havas decajn vestojn. Antaŭe mi kre-dis, ke vesto trikita el lanŝnuro



estas por mi io neatingebla dum la tuta vivo, sed post la socialisma eduka movado mi havigis al mi ankaŭ tian.



Greno fariĝas ĉiam pli multa ĉe ni jaron post jaro, kaj ni ĉesas maltrankviliĝi pro malsato. En la jaro 1965 mia familio ricevis 2,700 ĝinojn da greno. Tamen mi aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, neniam forgesos la amaran pasintecon kaj ŝpareme konsumas la grenon, bone kaj detale kalkulante.



Mi ekstudis verkojn de Prezidanto Maŭ en la socialisma eduka movado. La vortoj de Prezidanto Maŭ estas facile kompreneblaj

“Tio dependas de la flua forto,” diris la ŝipisto. “Ordinare oni bezonas tempon por preno de du aŭ tri manĝoj por ir-reira veturado. Kiam la fluo ŝveliga, oni bezonas pli.”

“Kie ankras la ŝipoj, kiam oni ripozas?” demandis la korpusestro.


“Tie, ĉe Hekoŭ,” diris la ŝipisto ekmontrante al la nordo. “Tie la fluo estas trankvila.”

Tiel babilante ni traesploris la topografion de la areo inter Hekoŭ kaj Janŝujuan kaj la

tutan tagon ni pasigis en neĝo sur la bordo de la granda rivero.

Vespere, denove ekneĝadis kaj ni reiris al la vilaĝo spite al tio. Post la tuttaga peniga irado, ĉiuj ni sentis kaj malvarmon kaj lacon. Sed kamarado korpusestro aspektis neniom laca kaj ĉiam vigle iris sekvante la paŝojn de la vojgvidantoj. Tamen malaperis lia intereso ĝui la pejzaĝon. Li meditadis dum la irado. Mi divenis el mia sperto akirita en la pasinteco, ke en la cerbo de la estimata estro formiĝas kaj maturiĝas saĝa kaj granda plano de agado.

kaj senescepte tuŝas mian koron. Mi petis mian filon voĉlegi por mi kaj mi mem detale notis ĉion en mia kapo. Mi havas memfidon bone lerni verkojn de Prezidanto Maŭ.



El la verkoj de Prezidanto Maŭ mi ekonis tri homojn (Ĝang Side, Bethune kaj Malsaĝa Avo), ricevis unu balailon (*Kontraŭ Liberalismo*), kaj ekkomprenis la veron, kiun homo devas sekvi kiel homo, tiel ke mi sentas senliman ĝojon kaj varmon en mia koro, kvazaŭ mi vidus Prezidanton Maŭ mem kaj aŭdus lian personan instruon.



Vortoj de Prezidanto Maŭ hele lumigas mian koron.

Mi ne povosciis legi, do mi klopodis aŭskulti, demandi, pensi kaj memori kiel eble plej multe.




Mi decidis ellerni unu ideografian po tri tagoj. Tial nur post unu monato mi jam ellernis la frazojn “servu al la popolo” kaj “kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”.



Kion mi lernis el verkoj de Prezidanto Maŭ, ĉion mi tuj aplikas en mia agado. Prezidanto Maŭ instruas al ni servi al la popolo “komplete” kaj “senrezerve”, mi do ekzakte tiel

完全

faras laŭ lia instruo. Se mi ne sekvus lian vorton, ĉu mi ankoraŭ povus esti kalkulata kiel malriĉa kamparano? Tial mi faris jenajn aferojn:



Miaj kokoj bekis rizgrajnojn en la kampo de la najbara brigado antaŭ mia domo. Se tio okazus antaŭe, mi certe pensus: La kampo estas de la naŭa brigado, sed ne de la nia; rikolti pli aŭ malpli multe tute ne koncernas min; cetere la rizgrajnoj estas tiel multaj, ke la bekado de kokoj konsumos ilin kvazaŭ hareton el la korpo de bovo. Sed nun kontrolante tian penson per la verko *Servu al la Popolo*, mi eksciis, ke tiaj pens-kaj ag-manieroj estas tute eraraj. Mi do plektis el propra pajlo barilon por debari la kamon.



En iu fojo nia brigado decidis vendi kotonon en la dua tago. La brigadestrino por virinoj timis ke tempo mankas por laŭnorme purigi la kotonon kaj lasis nin purigi la kotonon malpli severe. Se tio okazus en la pasinteco, mi certe konsentus tian aranĝon por akiri pli da laborpoentoj. Sed en ĉi tiu fojo la vortoj “komplete” kaj “senrezerve” aperis en mia penso, kaj mi diris al miaj koleginoj: “Ni kulturas teron por la revolucio, kaj ni devas fari ĉion en bona kvalito. Ni eklaboru tuj post tagmanĝo kaj morgaŭ alvenu je unu horo pli frue kaj komencu la laboron je la sesa horo.” Ĉiuj konsentis al mi, kaj la tasko estis plenumita je la tagmezo de la dua tago. Ĉar la kotonon estis bonkvalite purigita, ĝi ricevis altan prezon kaj tio profitigis ankaŭ al la brigado. La brigadestro ĝoje diris: “Jen ĉi-okaze mi vidas la

ŝanĝon de spirito en materion.” Ankaŭ la brigadestrino diris: “Vere la unua faktoro estas homo.”



Iufoje, revenante de la strato, mi rimarkis du garbojn de pajlo apud la vojo. Se tio okazus en la pasinteco, mi tute ne volus zorgi tian aferon. El du pajlgarboj por pli ol 90 personoj de mia brigado, kiom mi povus ricevi? Per ĝi oni ne sukcesus eĉ varmigi kaldronon. Sed nun memorante la vortojn “komplete” kaj “senrezerve” ditajn de Prezidanto Maŭ, mi pensis, ke ni devas bone zorgi ĉion por la kolektivo, eĉ se ĝi estas nur pajlero aŭ lignopeco. Prezidanto Maŭ instruas al ni “diligente kaj ŝpareme administri la komunumon”, kiel mi povas sendevkonscie preteratenti kolektivajn aferojn? Sennombraj estas brigadoj en nia lando. Se ĉiu agus tiel, la malŝparo estus vere terura! Mi do transportis la du pajlgarbojn al la tenejo.



Sur la kampo restis ankoraŭ iom da nefortirigitaj kotonarboj post rikolto. Kaj la vetero estis tre malvarma. Mi ne pensus ilin eltiri, se tio estus en la pasinteco. Sed nun havante la konscion, ke mi estas inter la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj devas tutkorezorgi pri la kolektivo kaj la revolucio, mi eltiris la pririkolitajn kotonarbojn kaj ligis ilin en du garbojn.



Iufoje mi estis sendita al transiga stacio de la Manĝaĵa

Kompanio por plankumi porkejojn. Mi trovis, ke restas ankoraŭ grajnoj sur la pajloj, kaj ekpensis ke Prezianto Maŭ instruas al ni, ke ni devas prepari nin por alfronti militon kaj katastrofon, ni do ne devas malŝpari grenon. Tial mi petis aliajn kvar maljunulinojn kolekti kune kun mi la restantajn grajnoj sur la pajloj.



En alia fojo ni sterkis kampon de tritiko. La cindro el porkejo kuniĝis en buloj, kiuj povus

premdifekti la junajn tritikplantidojn. Por dispecetigi la bulojn, ni devis uzi la manojn, sed la porkurino ja tiel naŭze malbonodoris. Kion fari? Mi memoris la vorton de Vang Gie: "timu nek penadon nek morton" kaj komencis dispecetigi la sterkbulojn por ke la plantidoj ne difektiĝu kaj havigu al ni bonan rikolton en la venonta jaro.



Porkino de la brigado naskos idojn. La brigado bezonis pajlojn por fari al ŝi neston. Kaj oni devis iri al Tajcang por aĉeti pajlojn. Mi kaj Vang A-an vidis forĵetitajn pajlojn sur la malprofundejo de la rivero. Ni do tuj levis la pajlojn el la akvo por uzi ilin en la porkejo. Se estus en la pasinteco, mi certe pensus, ke tio estas afero de la porkisto kaj havas nenian rilaton kun mi. Nun mi jam

Gu Ataŭ prezentas al batalantoj de la Aera Armeo de ĈPLA sian penadon por praktikado en studado de verkoj de Prezianto Maŭ.


studis verkojn de Prezianto Maŭ, do mi devas fari bonajn aferojn por la brigado.



Lerninte la revolucionan spiriton de Daĝaj-komunumanoj, kiuj akiras altprodukton sur montareo, mi pensis ke niaj kampoj estas pli fekundaj ol la iliaj, ni do des pli devas multe kolekti sterkon por akiri altprodukton. Mi kunvokis la du aliajn sambrigadanojn, Vang A-an kaj Su Ĝaŭdi, por kolekti la postlasitan porkejan sterkon ĉe la kanaletoj per balailetoj kaj disĵetis ĝin sur la kampon de tritiko, por ke la sterko ne perdiĝu de pluvakvo. Kvankam la laboro dolorigis mian talion, tamen ĝi ĝojigis mian koron.

Lerninte la spiriton de kamarado Bethune "kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem", mi faris jenajn aferojn:

Iun fruan matenon, mi aŭdis kelkajn komunumanojn vektopor-tantaj ekster mia domo lagŝlimon. Iuj diris, ke en la lageto restas ankoraŭ multe da akvo kaj ke hodiaŭ matene ili certe ne povos multe transporti la gliteman ŝlimon. Tion aŭdinte, mi tuj ellitiĝis, ĉar min instigis la vortoj "kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem". Kvankam mi estis iom malsaneta, tamen por altigi la laborefikon de la ŝlimportantoj kaj pripensi unue la malfacilon de aliaj kaj nur poste la propran, mi ellitiĝis kaj partoprenis la matenan laboron kun





aliaj komunumanoj. Fine, je unu mateno, la restanta akvo en la lageto estis plene elĉerpita.

La piedoj de onklo Bing fartis malbone. Li vektoportis foje karotojn kaj iradis tre malfacile. Mi volis vektoportu anstataŭ li, sed li ne konsentis konsiderante ke ankaŭ mi estas malforta. Mi do portis unu korbon kaj unu dusakon da karotoj al lia hejmo kaj lasis lin atendi survoje. Atinginte lian hejmon, mi venigis lian edzinon por vektoportu la restantajn karotojn. Alifoje, li aĉetis en la bazaro karbobulojn. Mi portis por li 25 kilogramojn



da karbobuloj ĝis lia hejmo. Li foje kaj refoje dankis min. Mi diris al li, ke li ne danku min, sed Prezidanton Maŭ, ĉar tiu instruis min tion fari.

Tre malforta estis iu virino post nenormala akuŝo. Informiĝinte pri tio, mi donacis al ŝi duonkilogramon da sukero kaj ses ovojn. En la pasinteco mi certe ne donus ilin kaj mem uzus ilin por fari kukojn kaj prepari ovaĵon. Sed nun mi



komprenas, ke ĉiuj kamparanoj estas samfamilianoj kaj devas helpi sin unu alian.

Iu virino malsaniĝis. Mi vizitis ŝin kaj portis al ŝi kvin ovojn.



Kaj en la dua fojo mi donacis al ŝi duonkilogramon da poligona faruno.

Iufoje mi vidis onklon Bing falĉanta herbojn por ŝafo en verdsterka kampo de la brigado. Se tio okazus en la pasinteco,

mi certe nenion dirus aŭ eĉ mem ankaŭ irus falĉi. Sed nun mi scias, ke "ne diri vidalvide, sed klaĉi postdorse" kaj "flankenlasi ĉion nekocernantan sin" estas liberalisma sinteno, kaj ke mi ne devas fariĝi ĉionjesulo. Mi do tuj kritikis lin. Ankaŭ li




kondukis bone, kaj akceptis la kritikon sen antipatio.

Mia filo Kunĵong, kiel baza milicano, ne obeis ordonojn de sia estro. Informiĝinte pri tio, mi demandis lin: "Vi ordonon ne obeas, ĉe la propra opinio obstinas, nur favoron de la organizo postulas, sed organizan disciplinon ignoras. Kiel vi lernis de la verkoj de Prezidanto Maŭ?" Tiuvespere mi okazigis familian kunvenon, kaj ĉiuj edukis lin per la vero, kiun instruis al ni Prezidanto Maŭ. Poste li vere ŝanĝiĝis, korektis siajn erarojn kaj tre serioze observas la disciplinon. Aŭskultinte kunvokan fajfadon, li tuj



eklevas sin kaj ofte atingas la kolektejon pli frue ol aliaj.

Mia tuta familio studas verkojn de Prezidanto Maŭ. Vespere ni studas ĉirkaŭ la tablo. Sur la muroj pendas vortoj de Prezidanto Maŭ kaj ni ilin lernas ĉe manĝado kaj antaŭ enlitiĝo. Kaj ni aplikas kion ni lernis.



Ankaŭ mia maljuna kunulo faras bonajn aferojn post la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Li hakis 25 proprajn bambuojn kaj plektis ĉirkaŭbarilon de kokoj por la kolektivo.



Mia pliaĝa filo Hjuĵong vidis en sia fabriko, ke sakoj da



kotono falis en riveron, kaj tuj saltis la unua en la akvon por ilin elakvigi.

Mi ankoraŭ igos ĉiujn membrojn de nia brigado, maljunajn kaj junajn, virajn kaj virinajn, studi verkojn de Prezidanto Maŭ. Nur se ĉiuj serioze studas, ni povos bone kulturi la teron



gardante unue la kvaliton anstataŭ laborpoentoj, kaj efektive kulturi teron por la revolucio.

Por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj bone fari produktajn laborojn, estas necese elstarigi politikon. Bone produkti ja estas subteno al la Popola Liberiga




Armeo, al regionoj trafitaj de katastrofoj kaj al la vjetnama popolo.


En la studado de verkoj de Prezidanto Maŭ, mi pretas atente aŭskulti, detale memori, pacience pensi, humile demandi kaj decideme fari. Kaj mi neniam cedos en la studado de verkoj de Prezidanto Maŭ antaŭ la ŝarĝo de multaj hejmaj laboroj, la malhelpo de analfabeteco, la okupiteco en produktado kaj la urĝeco de produktaj taskoj.



Mi cetere prenas en mian vidon la pordegon Tian-anmen starante ĉe mia dompordo. Mi



kaj laboros kaj lernos ĝis mia lasta spiro de la vivo, kaj edukos la gefilojn, ke ili bone studu kaj apliku la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj fariĝu daŭrigantoj de la revolucio.



Prezidanto Maŭ estas ruĝa suno en nia koro

北京二龙路学校(分校)万缘洋


Van Lufu (11-jara knabino)

Pentraĵoj de Infanoj

Lerte pafas la vjetnama popolo

Ĝou Ŝigjun (10-jara knabo)






Raporti ĝojigan novaĵon al Prezidanto Maŭ

Liu Gianĝong (9-jara knabo)

Por subteni agrikulturon

Li Hiang (7-jara knabo)





Sin ekzerco por revolucio

Ju Guanghing (11-jara knabo)

Eternas la Revolucia Juneco

—Noto pri la ruĝarmeano kaj hospitalestro Lu Kajjoŭ

LU Kajjoŭ, la estro de iu hospitalo ĉe la landlima regiono de Junnan, vivadas inter la landlimaj gvardianoj kaj diversnaciaj popolanoj, migrante trans montojn kaj riverojn kun verkoj de Prezidanto Maŭ en la sino kaj pakaĵo sur la dorso kaj kunportante diversajn medikamentojn.

Lu Kajjoŭ armeaniĝis en 1933. Dum la jaroj de revolucia militado, li partoprenis batalojn en la sudo kaj la nordo, kaj faris meritoplenajn kontribuojn unu post alia. Veninte al Junnan-provinco post la Liberigo de la tuta lando, li restas same viglanima kaj entuziasma kaj vivas migrante. Li diris, ke li laboris 17 jarojn ĉe landlima regiono, transposteniĝis dume 16 fojojn, el kiuj 8-foje li respondecis pri starigo de nova institucio kaj tuj post la fondo de ĉiu establaĵo li tuj foriris aliloken por starigi alian novan fondaĵon. Ĉiufoje, li laboris gaje kaj diligente, klopodante kiel eble plej bone plenumi sian taskon kun la spirito ekskluzive kaj senrezerve servi la popolon.

Foje li respondecis pri la starigo de rondira kuractrupo por la landlimaj gvardianoj ĉe Avamonto. Li prenis kun si dorssakon kaj sekmanĝaĵon kaj ekiris kun la kamaradoj de la kuractrupo, kondukante ŝarĝbrutojn, kiuj portis medikamentojn. Kiam ili transpasis montegon survoje, unu el la ŝarĝbrutoj falis de sur alta krutaĵo kaj mortis!

La rokmuro estis tre kruta kaj ne troviĝis vojo kondukanta malsupren. Sed la medikamentojn oni devis nepre repreni! Lu Kajjoŭ tuj sin ligis je la talio per ŝnuro kaj diris al la kamaradoj, ke ili lin malsuprenigu. Ja estis danĝere tion fari. Tiam li ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **“La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan.”** Li pensis krome: “La Partio min kulturis dum tiom multe da jaroj ja por ke mi fariĝu homo utila al la popolo. Do en kriza momento mi devas brave elpaŝi por starigi, por la junuloj, ekzemplon de sentimeco al suferoj kaj morto por la revolucio.” Tiam, li neniom plu ĝeniĝis pri danĝero. Li malsupreniĝis la unua, kaj kelkaj aliaj kamaradoj lin sekvis. Post kelkhora serĉado, fine ili retrovis la perditajn medikamentojn en herbaro. Li gvidis sian trupon kuraci rondire malsanulojn de armeaj trupoj kaj diversaj nacioj. La dekelkaj membroj de la trupo piediris milojn da lioj (lio = $\frac{1}{2}$ kilometro) dum pli ol duonjaro kaj bone plenumis la taskon komisiitan de la Partio kaj la supera instanco.

Ĉu tiu ĉi ruĝarmeata batalanto estas “denaske ruĝa” kaj ne ricevis influon de burĝa ideologio? Lu Kajjoŭ diris: “Ne.” La kaŭzo, ke li ĉiam zorgas pri la Partio kaj popolo kaj senlace laboras por ili, kuŝas en tio, ke li legas verkojn de Prezidanto

Maŭ, aŭskultas liajn vortojn kaj agas laŭ liaj instrukcioj, kaj precipe en tio, ke li fojrefoje lernis la “tri malnovajn artikolojn” nome *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*, kaj pene strebis en reformo de sia mondkoncepto.

Dum sia ideologia remuldo, li travivis la jenon: Post la Liberigo de la tuta lando en 1949, li pensis: “Mi batalis sude kaj norde dum multaj jaroj kaj nun ni venkis finfine, do mi povas iom senlacigi la piedojn, kiel la proverbo diras: ‘Post la tagoj de sufero, venas tagoj de mielo.’ Plej bone estas lernadi en loko kvieta.” Li opiniis krome: “Ne tro pretendema mi estas. La gvidantoj mem tiel aranĝus por mi eĉ sen mia postulo.” Sed kontraŭe, la gvidantoj translokigis lin al laborposteno en la limregiono de Junnan. Pro longdaŭra kruela regado de la reakciularo, tiam la vivo de la popolo en la limregiono de Junnan estis ege malfacila. Kontraŭe al lia deziro ekriprozi en loko komforta, li estis transpostenigita en montaron piedlacigan; tial li tre ĉagreniĝis.

Tiam li studis la raporton de Prezidanto Maŭ al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Prezidanto Maŭ diris: **“Pro la venko, eble kreskos en la Partio la humoroj de aroganteco, de memtitolita meritulo, de stagnado kaj senvoleco por progreso kaj de avido al plezurĝuado kaj malinklino al plua malfacila vivo.”** Prezidanto Maŭ diris krome: **“Eble troviĝas tiaj komunistoj, kiuj estas neniam konkeritaj de la malamikoj kun pafiloj kaj meritlas la titolon de heroo antaŭ tiuj malamikoj, sed ne povas rezisti kontraŭ la atako per sukertegitaj obusoj, kaj antaŭ tiuj ili estos venkitaj.”** La vortoj de Prezidanto Maŭ kaŭzis intensan batalon en lia penso. Li pensis: “Dum la militaj jaroj, mi transgrimpis neĝmontojn, trairis marĉozan stepon, longe marŝis, partoprenis batalojn kaj estis malcedema al la malfaciloj. Kial nun mi ŝanĝiĝis? Kial mi ne pli multe zorgas pri la revolucio kaj la popolo, sed kroĉiĝas al individuaj problemoj? La radikala kaŭzo kuŝas en tio, ke mia mondkoncepto ne plene reformiĝis kaj mi ankoraŭ ne firme starigis la penson servi la popolon ‘ekskluzive’ kaj ‘senrezerve’.” Li ekkonsciis, ke serioza demando staras antaŭ li: Ĉu halti duonvoje aŭ konduki la revolucion ĝis la fino?

Li detale rememoris sian vivon antaŭ kaj post sia partopreno al la revolucio. En 1933, kiam Lu Kajjoŭ estis 14-jara, lia patro grave malsaniĝis. Lia patrino iris kun li kaj lia frateto en neĝkovritan kamparon por elfosi herbajn radikojn kaj plenigi per ili la stomakon. Poste, liaj patrino kaj frateto

mortis de frosto en neĝejo. La patro diris al li: “Mia filo, mi aŭdis, ke la Ruĝa Armeo estas armeo de ni malriĉuloj. Iru ĝin serĉi por teni vian vivon. Nepre venĝu viajn patrinojn kaj frateton!” Sekve li aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj pasigis dekkalkajn jarojn de milita vivo sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Nun post depreno de la regpotenco, li fariĝis kadro kaj vivas pli bone, li tamen ekkalkulas pri siaj personaj demandoj. Tion pensante, dolore li pentis kaj hontis ke li agis tiel maldankeme al la Partio kaj Prezidanto Maŭ. El tiu okazaĵo li komprenis, ke oni haltos en revolucio je certa momento, se oni havas nur nekulturitan klasan sentimenton al la revolucio kaj ne estas reformintan mondkoncepton. Li profunde konsciis, ke por konduki la revolucion ĝis la fino sub la gvido de Prezidanto Maŭ, li devas plene reformi sian mondkoncepton. Kaj la plej grava afero por li estis legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj servi la popolon tutkore kaj plenanime. Tial dum la lastaj jaroj kaj precipe post kiam kamarado Lin Biaŭ alvokis la tutan armeon amase studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, li ĉiam atente studas la “tri malnovajn artikolojn”. Li komprenis el sia propra sperto, ke la veteranaj kadroj devas reformi sian mondkoncepton kun la spirito “kapti eĉ horetan” por teni sian revoluciecon en la jaroj de maljuneco.

Dank’ al studado de la “tri malnovaj artikoloj”, li gajiĝis kaj havis ĉiam pli grandan entuziasmon. En 1965, la organizo ordonis, ke li faru preparon por fondo de hospitalo. Tiam estis multaj malfaciloj: mankis loĝejoj kaj akvo por trinki. La laborantoj sub lia gvido devenis de pluraj institucioj kaj leviĝis problemoj en ideologio. Fronte al tiuj malfaciloj, Lu Kajjoŭ kaj aliaj gvidantoj de la hospitalo kune organizis la laborantojn studi la “tri malnovajn artikolojn”. Por ke la komandantoj kaj batalantoj de la hospitalo bone komprenu la instruojn de Prezidanto Maŭ, ili rakontis pri la bravaj agoj de revoluciaj martiroj dum la militaj jaroj kiuj por la revolucio eltenis suferegojn kaj lacegon, timis nek suferon, nek morton, kaj pri la historio de la Popola Liberiga Armeo kiu venkis per fusiloj kaj milio la bone ekipitajn malamikojn. Per tio ili kuraĝigis la personaron por subteni la mondan revolucion per konkreta ago bone konstrui la hospitalon. La vortoj de Prezidanto Maŭ estas plej altnivelaj, plej altprestiaĵaj kaj plej potencaj. Ĉiu el liaj diroj estas vero kaj egalas al la valoro de centmilo da alies diroj. Post lernado de la “tri malnovaj artikoloj” ĉiuj ekhavis revolucionan entuziasmon, kaj la kamaradoj, kiuj havis egoisman kalkulon, memvole forĵetis la balaston. Ili diris unuj post aliaj, ke ili faros laŭ la ekzemplo de

Ĝang Side tutkore kaj plenanime servi al la popolo, imitos la spiriton de N. Bethune esti ekstreme respondecema al la laboro kaj ekstreme varmkora al la kamaradoj kaj popolo, kaj timos nenian malfacilon, kaj agos kiel la Malsaĝa Avo en kuraĝa batalado kontraŭ malfaciloj. Sekve de tio, la hospitalo rapide fondiĝis.

En la pasintaj dekelkaj jaroj, Lu Kajjoŭ ĉiam daŭrigis kaj disvolvis la gloran tradicion de senluksemo kaj penemo. Li diris, ke ĉasado de komfortoj kaj ĝuoj en la vivo kondukos al koruptiĝo sub atako de la burĝaro per sukertegitaj obusoj, al "paca evoluo". En 1965, la hospitalo sentis akran malsufiĉecon de la ĉambroj. Ili dividis grandajn ĉambrojn en ĉambretojn per lignaj vandoj, kaj li prenis kiel sian litĉambron, ĉambreton kun plankspaco de malpli ol 10 kvadrataj metroj. Mankis al li skribotablo, do li uzis anstataŭe grandan librokeston. Mankis lito, do li trovis kelkajn tabulojn, ilin metis sur subtenilojn kaj uzis kiel liton. Pli poste, oni sukcesis pruntepreni litojn de lokaj institucioj, kaj iuj kamaradoj diris, ke li prenu unu por si antaŭ aliaj. Sed li pensis, ke Prezidanto Maŭ instruas, ke ni ne devas unue kalkuli por ni mem kiam ni alfrontas ion. Ĉu la laborantoj povas meriti la nomon de servanto al la popolo, se ili nun prenas por si litojn, dum kiam la malsanuloj ankoraŭ ne havas sufiĉe multe da litoj? Li ne prenis por si. Kiam oni akiris kuŝbretojn duafoje, iu denove volis substitui la lian per unu, sed li diris, ke oni devas ĝin liveri al alia. Tiel li cedis trifoje, kaj kiam ĉiu jam havis sian liton, li ankoraŭ uzis siajn tabulojn. La litkovrilo sur lia kuŝejo estis uzata dum multaj jaroj kaj flikita fojon post fojo.

En la komenco iuj diris, ke li agis supernormale. Sed el la instruo de Prezidanto Maŭ li profunde komprenis la jenon: Ne voli dividi dolĉon kaj maldolĉon kun la popolamaso estas danĝera tendenco. Ju pli multe oni konsideras pri sia vivo, des pli malmulte oni pensas pri servado al la popolo. Kalkulado pri manĝoj kaj vestoj estas triviala intereso kaj burĝa afekcio, dum senluksemo kaj penemo estas propra karakterizaĵo de la laboruloj kaj revolucia tradicio de la proletaro, kaj tio ankaŭ prezentas aspekton de ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo. Nun la revolucio venkis, la medio ŝanĝiĝis, la kondiĉoj aliĝis, sed la vivstilo de senluksemo kaj penemo nepre ne devas ŝanĝiĝi, spite al ĉiaj ŝanĝiĝoj! La propraj karakterizaĵoj de popola servanto nepre ne devas ŝanĝiĝi!

En Konstruado

PRINTEMPA FOIRO DE EKSPORTAJ VAROJ SOLENE INAŬGURIĜIS EN KANTONO

La solena inaŭguro de la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio 1967 okazis la 15-an de aprilo en Kantono. Ĉi-foje la Foiro estas malfermita en la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio, en tia bonega situacio, en kiu la revolucia popolo de Ĉinio akiris gigantajn sukcesojn, en varma respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton". Per sia grandioza amplekso kaj tute nova fizionomio ĝi manifestis la imponajn sukcesojn atingitajn en diversaj kampoj de politiko, ekonomio k. a. de la ĉina popolo, alte tenanta la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong.

La bonega situacio en la industria kaj agrokultura produktado de Ĉinio, kiu aperis dum la granda proleta kultura revolucio, donis pli solidan bazon materian por nia eksterlanda komercado. El pli ol dudek mil specoj de varoj ekspozitaj en la Foiro, pli ol kvar mil estas novaj kaj plejparte produktitaj dum la granda proleta kultura revolucio. Cetere, troviĝas tie, i. a., modeloj kaj specimenoj de la produktaĵoj, kiuj reprezentas parton de la plej novaj atingoj en la scienco-tekniko kaj industria produktado de Ĉinio dum la lastaj jaroj. Ekzemple, sinteza benzeno kaj sinteza insulino, kiujn Ĉinio sukcese provfabrikis kaj produktas la unua en la mondo, estas du el ili.

La novaj industriaj kaj riĉaj agrokulturaj produktaĵoj ekspozitaj en la Foiro, vive spegulas la grandan potencon de la slogano elmetita de Prezidanto Maŭ: "Industrie lernu de Daking kaj agrokulture lernu de Daĝaj." La altklasaj oleoj por aviado en la Kemiindustria Halo kaj la diversspecaj malregulformaj ŝtalproduktoj, radringoj por lokomotivoj ktp. en la Halo de Metaloj kaj Mineraloj estas la atingoj de la ĉina laboristaro en varma respondo al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ankaŭ la granda atingoj de la "detruo de kvar malnova-oj kaj starigo de kvar nova-oj" de la granda proleta kultura revolucio speguliĝas sur la ekspozitaj metiartaĵoj, produktoj de malpezaj industrioj por ĉiutaga uzado kaj ŝpinteksaĵoj. Tiuj ĉi ekspozitaĵoj rikoltis ĝenerale laŭdojn en la Foiro.

Porti Medikamentan Keston por Komunumanoj

LA granda verko de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune* helpis min solvi mian ideologian demandon por fariĝi sanitaristino.

Fininte mian lernadon en elementa lernejo je la jaro 1961, mi revenis al mia produkta brigado kaj partoprenis agrikulturan laboron. Poste mi laboris unu jaron en la vestfarejo de la komunumo. Printempe de 1965, la partia filio de la brigado decidis sendi min al sanitarista kurso, por ke mi poste fariĝu sanitaristino. Tiam mi ne volis akcepti tiun okupon, ĉar mi jam havis planon labori en fabriko ekde la posta parto de la jaro. Mi do rifuzis la decidon sub la preteksto, ke mankas al mi sufiĉa klereco por tio. Vidante ke mi estas obstina en rifuzado, la gvidanto diris al mi: "Hodiaŭ ni ne decidu la aferon, unue vi lernu verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ni poste rediskutu pri la problemo." Vespere, kun la demando mi legis la artikolon *Memore al Norman Bethune* kaj venis al la frazojn: "**Estante fremdulo, li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo, sen ajna egoisma motivo. Kia spirito tio estas? Tio estas la spirito de internaciismo kaj komunismo, ĉiu membro de la Komunista Partio de Ĉinio devas lerni de li tiun spiriton.**" Mi ekpensis ke kamarado Bethune estas fremdulo, kaj li ne trovis la vojaĝon longa por veni al Ĉinio kun la celo helpi Ĉinion en ĝia revolucio kaj servi al la ĉina popolo. Mi estas junulino de la epoko de Maŭ Zedong, sed alfrontante al ia afero, mi kalkulas unue por mi mem, flanken lasante la devon servi al la popolo. Kian dankemon mi montras al la Partio kaj popolo, kiuj min kulturis? Mi sentis honton en la koro. Sekvintan tagon, mi diris al la partia filio ke mi konsentas lerni en la kurso.

Fininte la lernadon, mi ekiradis al produktaj grupoj por kuraci malsanulojn, kunportante medikamentan keston. En kia streĉado mi estis, kiam mi kuracis mian unuan pacienton! Timante eraron en diagnozo, mi ripetade demandis por certigi kaj poste donis al la malsanulo medikamenton. Kiam mi kuŝis sur la lito tiunokte, mi ankoraŭ maltrankviliĝis, timante eblan eraron en dono de medikamento. Frumatene de la

sekvinta tago, mi rapidis al la paciento kaj trankviliĝis, nur kiam mi vidis ke li jam resaniĝis.

Ĝuste kiam mi ekhavis memfidon en mia laboro, iuj diris, ke mi havas vere senpenan laboron ĉiutage iradi tien kaj reen kun medikamenta kesto. Aŭdinte tion, mi tre afliktiĝis. Post reveno al la brigado, mi konsideris foje-refoje, ĉu mi diru al la partia filio, ke mi ne plu portos la medikamentan keston. Post plurtaga batalo en mia cerbo, mi turnis min al verkoj de Prezidanto Maŭ kaj venis al la konkludo, ke la radiko de la demando kuŝas en tio, ĉu mi volantas servi al la popolo aŭ ne. Kamarado N. Bethune estis tre eminenta kuracisto, kaj li venis al la fronto de la Kontraŭjapana Milito de Ĉinio en malfacilaj militaj jaroj por servi al vunditoj kaj malsanuloj de la Okavoja Armeo. Mi laboras en la produkta brigado kun laboraj kondiĉoj tre bonaj, tamen mi ankoraŭ ne emas sindoni al mia laboro. En analizo ĝis la fino, en mia cerbo ja ludas diablan rolon la egoismo aspiri al laboro malmulte peniga sed multe enspeziga. Egoismo ja estas malamiko, kiu malhelpas la revoluciigon de mia ideologio. Mi devas nepre ĝin elradiki.

Iun tagon, venis al mi homo. Li diris al mi, ke infano de iu komunumano febras, kaj petis de mi senfebrigi-lon. Ĝuste kiam mi volis transdoni la medikamenton, mi ekmemoris la ekstreme respondeceman senton de kamarado N. Bethune al la laboro kaj lia ekstreme varman koron al kamaradoj kaj la popolo kaj pensis, ĉu tio estas respondecemo al la laboro kaj varma koro al la popolo, se mi donos al li medikamenton sen diagnozo al la malsanulo. Mi tuj kuris, kunportante la medikamentan keston, al la pacienteto, kies malsano estis efektive serioza. La patrino de la infano ĝuste ne estis hejme, mi petis iun sciigi la patrinon kaj mem brakportis la infanon al la hospitalo. Mi kuris 6-7 liojn en unu spiro antaŭ ol mi povis veturi per ambulanco. Kiam mi atingis la gubernian hospitalon, jam estis la 9-a nokte. La diagnozo montris, ke la infano suferas de meningito. La sekvintan tagon, la patrino de la infano venis al la hospitalo. La kuracisto, kiu rimarkis ke mi venis kun la malsanulo lastvespere, prenis min por familiano de la paciento kaj malaprobis ke tro

multe da familianoj vizitas la pacienton. Kiam mi volis klarigi, ke mi estas sanitaristino kaj ke mia veno al la hospitalo kun la malsana infano estas servo al la popolo, mi subite ekmemoris la kritikon de Prezidanto Maŭ al iuj homoj en la artikolo *Memore al Norman Bethune*: “Farinte ion, ili eksentas ke ili havas grandan meriton, kaj ŝatas sin laŭdi, timante ke aliaj ne scias.” Ĉe tio mi retenis la vortojn jam alvenintajn al miaj lipoj. Poste la infano resaniĝis, kaj ĝia patrino multe dankis al mi. Mi diris: “Danku ne al mi, sed al nia amata Prezidanto Maŭ, estas li, kiu instruis al mi tiel agi.”




Prezidanto Maŭ diris laŭde: “La spirito de k-do Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo.” En la laboro mi ĉiutage zorgas ke mi agu laŭ la normo de du “ekstreme”-oj. Dum somera laborplena periodo de agrikulturo, la temperaturo altas ĝis 38 C°. Iun tagmezon, kiam mi ĵus revenis de la kampoj post laboro kaj pretis ekmanĝi, oni diris al mi, ke iu komunumano de la 4-a produkta grupo suferis de akuta malsano kaj petis min al li. Tiam mi sentis varmecon, laciĝon kaj malsaton, kaj grumblis en mi, ke eĉ manĝon mi ne povas preni en kvieto. Sed ekpensante pri la du “ekstreme”-oj, mi tuj sentis malpravon en mia humoro. Mi do rapide iris kun la medikamenta kesto. Kaj mi estis okupita ĝis post la dua posttagmeze por fine sendi la pacienton al la hospitalo kaj fari necesan aranĝon. Tiutempe mi jam ne sentis malsaton kaj laciĝon sed ĝojon en la koro, vidante ke la paciento estas jam ekster danĝero.

Iufoje, kiam mi renovigis unĝventon por komunumano Jin Lingjuan, mi vidis, ke ŝi larmas, kaj informiĝis, ke ŝia ŝveliĝinta mano ne povas libere moviĝi dum mamnutrado de la bebo kaj lavado de urintukoj, sed la infano estis nur kvarmonata kaj estis neniu en la domo, kiu povus helpi ŝin. Mi diris al ŝi: “Ne malĝoju, mi dormos en via hejmo kaj helpos vin prizorgi la bebon.” Mi estas dudekjara fraŭlino kaj neniam prizorgis bebon. Se tio okazus en la pasinteco, mi certe ne konsentus fari ion tian, eĉ petite. Post studo de verkoj de Prezidanto Maŭ, mi komprenis, ke mi devas havi la du “ekstreme”-ojn. Jin Lingjuan estas mia klasa fratino, mi devas helpi ŝin. Nokte, mi dormis kun la bebo, ŝanĝis urintukojn por ĝi kaj ne abomenis la malpurajn.

En la 3-a produkta grupo estas maljunulino, kiu estas familiano de martiro kaj vivas sola en sia domo. Iufoje, vidante ŝin preni fabgrajnojn por semi, mi tuj ŝin helpis. Kiam mi vidis ke ankaŭ ŝiaj legomoj ne estas akvumitaj, mi do akvumis ilin por ŝi kaj cetere plenigis la akvujojn en ŝia domo. Kiam la avino insiste petis min manĝi ĉe ŝi, mi diris: “Se mi manĝos ĉe vi, tiam miaj faroj ne estas servo al la popolo.” Ŝi diris korduŝite: “Mi vivas ĝis 84 jaroj, sed neniam vidis tiel bonan kuracistinon.” “Prezidanto Maŭ instruis min fari tiel,” diris mi. La avino ne kredis kaj demandis: “Prezidanto Maŭ estas en Pekino, fore je miloj da lioj, kiel li povas instrui vin?” “Liaj instruoj estas skribitaj en liaj libroj, kaj mi lernas el liaj libroj,” respondis mi. Poste, kiam mi pasas preter ŝia domo, mi ĉiam vizitas ŝin kaj helpas ŝin fari ion.

Komence, ankaŭ mia panjo ne volis, ke mi fariĝu sanitaristino, sed nun ŝi jam ŝanĝis sian opinion. Mia panjo diris al mi: “Ankaŭ mi studas verkojn de Prezidanto Maŭ en nia fabriko, kaj mi devas forbalai la malnovajn ideojn el la cerbo kaj tutanime servi al la popolo.” Ŝi diris plie: “Via patro suferis de meningito antaŭ la Liberiĝo kaj mortis pro manko de mono por kuraciĝi en hospitalo. Hodiaŭ en la nova socio, kiel la Partio kaj registaro prizorgas la sanon de la komunumanoj!” Pri la morto de mia patro, panjo jam parolis kun mi plurajn fojojn. Ĉi-foje mi havis tute alian komprenon; mi sentis ke mia malgranda medikamenta kesto plene montras la senkomparan superecon de la socialisma socio. Ĝi ne estas malgranda kesto, sed grava tasko de zorgo pri la popola sano, kiun la Partio konfidis al mi!

Kamarado N. Bethune estis granda internaciisma batalanto kaj fame konata kuracisto en la mondo. Estas neeble fari komparon inter li kaj mi. Sed, ĉiu homo havas sian kapablon, grandan aŭ malgrandan, se li nur havas nenian egoismon en la spirito, li povos fariĝi homo tre utila al la popolo. Mi volas ĉiam aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj lerni de kamarado Bethune: esti ekstreme respondecema al la laboro kaj ekstreme varmkora al kamaradoj kaj la popolo kaj ĉiam strebi al pli alta nivelo en la kuracarto. Mi nepre studos verkojn de Prezidanto Maŭ kaj tutanime servos al la popolo dum mia tuta vivo.



Sub la helpo de ĉinaj specialistoj, la zanzibara popolo trovis por si fonton de dolĉa akvo.

ZONG HE:

Servi al la Popoloj de Azio kaj Afriko Kiel Bethune

— Notoj pri Ĉinaj Specialistoj kaj
Laboristoj en Fremdlandoj

SUB la inspirado de la proleta internaciisma spirito de kamarado Norman Bethune, la specialistoj kaj laboristoj senditaj de Ĉinio al aziaj kaj afrikaj landoj faris kontribuon por la disvolvado de sendependa nacia ekonomio de tiuj landoj. En ilia kunlaborado kaj kunvivado kun la popolanoj de tiuj landoj elkreskis profunda amikeco, kiu disradias la brilon de la penso de Maŭ Zedong.

KORTUŜA TRIUMFOKANTO

En julio de 1966, inunda katastrofo trafis Ulan-Batoron, la ĉefurbon de la Mongola Popola Respubliko. La ĉinaj laboristoj tie savantaj la helpo-materialojn liveritajn al Mongolio aŭdis urĝajn helpkriojn de proksime, tuj organizis savtaĉmenton el du cent anoj, kuris tien, ensaltis en la fluegon profundan ĝis talio kaj komencis vivoriskan lukton por savi mongolajn popolanojn.

Kuraĝigate de la verko de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune* la ĉinaj laboristoj, helpe laborantaj en Mongolio, heroe savis la vivon kaj havaĵojn de la

mongola popolo, riskante sian vivon. Kiam maljuna laboristo Baj Ĵujseng savis mongolajn fratojn, lia kruro estis gratvundita de io alportata de la fluego, kaj sango torente elfluis, sed neniu sukcesis lin persvadi, ke li haltu en la savado. Laboristo Vang Guang-en kvar fojojn surdorse forportis mongolajn fratojn el danĝero. Lastfoje kiam li savis iun virinon, lia forto jam elĉerpiĝis, sed li penege persistis kaj finfine sukcesis ŝin eldanĝerigi.

Aliloke, unu aŭtobuso kun multaj mongolaj civitanoj estis kaptita de la fluego. Unu laboristo nomata Jang Fengtu ligis dikan ŝnuron al si je la talio, spite ĉion transnaĝis al la aŭto, kaj ligis la ŝnuregon sur ĝin. Nur dank' al tio, multaj kamaradoj povis ĝin atingi, kaj post kvar horoj da energia luktado, pli ol cent dudek mongolaj fratoj estis savitaj el la fluego.

La heroo agado de la ĉinaj laboristoj, kiuj helpas Mongolion, ĉie ricevis varman laŭdon de la mongola popolo. Iu mongola amiko diris kun emocio: "La intima amikeco de niaj du popoloj estas pli longdaŭra ol la ĉiam fluegantaj riveroj kaj pli profunda ol la maro."

SERĈI DOLĈAN AKVON POR LA ZANZIBARA POPOLO

La Zanzibar-insulo de Tanzanio estas ĉirkaŭata de lazura maro, sed al ĝi mankas trinkebla akvo, kaj tio ege ĝenas la lokanojn en produktado kaj vivteno.

Por helpi Tanzanion tien alvenis ĉina esplortaĉmento por trovi akvofontojn. Nelonge post sia alveno, kiam la kamaradoj de la taĉmento ankoraŭ ne refreŝiĝis de la vojaĝa laco, ili jam ekagis kaj per laborado en 18 sinsekvaj tagoj mem transportis de la haveno la ilojn necesajn por drilado kaj materialojn kun pezo de pli ol kvincent tunoj en laborejon. Poste, ili komencis longan piediradon sur la fremda insulo. Manĝante en vento kaj tranoktante en libera ĉielo, ili faris intensan putdriladon.

Glate plenuminte la driladon de la unuaj putoj, ili renkontis novan malfacilon. En tiu lando oni ne povas trovi specon de gruzo, necesan por putkonstruado. En la tuta orienta Afriko, oni diras, tian gruzon havas nur iu brita kompanio de putdrilado en Najrobi, la ĉefurbo de Kenjo. La kamaradoj de la ĉina esplortaĉmento por trovi akvofontojn tamen neniel povis etendi la manojn al koloniistoj. Ili konsiliĝis kun la konstrua departemento de Zanzibaro kaj decidis apogi sin sur la propraj fortoj kaj uzi anstataŭe taŭgajn gruzojn troveblajn ĉe la loko. Traserĉinte la tutan insulon, finfine ili trovis uzeblajn gruzojn kun simila kvalito. Sed tiaj gruzoj estas miksitaj kun sablo. Por akiri tian materialon oni devis elakvigi grandan kvanton da sablo-gruza miksaĵo kaj poste apartigi la gruzojn de la sablo per kribrado. Vizaĝe al tiaj malfacilaj kondiĉoj, la kamaradoj de la esplortaĉmento, sub la arda zanzibara suno multe ŝvitlaboris, kaj ricevis kelkdek tunojn da gruzoj kaj tiel garantiis la konstruadon.

En pli ol dek monatoj, la specialistoj de la ĉina esplortaĉmento trapasis sennombrajn vilaĝojn kaj sovaĝejoj por trovi akvofontojn kaj sukcese drilis 13 putojn profundajn. Ĉiufoje, kiam akvokolono ŝprucis el la tero, la kamparanoj proksime aŭ de malproksime rigardis tion kiel grandan ĝojon. Kun kanto kaj danco ili alvenis tien por gratuli la ĉinajn specialistojn kaj gustumi la dolĉan akvon, elterigitan de ĉi tiuj por ili. Forte kunpremante la manojn de la ĉinaj specialistoj, multaj kamparanoj plenkore laŭkriis: “Ĉinio, Maŭ Zedong, bonegaj! Multajn dankojn!” “Dankon al nova Ĉinio, dankon al Maŭ Zedong!”

Dum sia vizito al la putdrilejo, iu altranga oficisto de la Tanzania Registaro diris tre emocie: “Trinkante la akvon oni devas pensi pri la fonto. Ni, zanzibara popolo, generacion post generacio neniam forgesos la amfavoron de Maŭ Zedong, kiu alsendis al ni la ĉinajn specialistojn.”

URĜE SAVI GRAVE MALSANAN INFANON DE SOMALIO

Ibrahim, somalia kvarjara infano, suferis gravan traĥeobstrukcon pro engluto de iu objekto en la traĥeon.

En la komenco la patro portis Ibrahim al la sovetunia kurac-brigado en sia hejmloko Kismaju


por lin kuraci. Sed la sovetuniaj kuracistoj diris: “Limigite de la kondiĉoj, ni ne povas lin akcepti.” Por sin savi, la infano devis esti sendita al Degfar-hospitalo en la ĉefurbo Mogadiŝu, fondita de la Komuna Merkato de Okcidenta Eŭropo kaj “plej bone ekipita”. La patro kun la filo traveturis pli ol kvarcent kilometrojn kaj finfine atingis la hospitalon, sed tie la burĝaj kuracistoj de la eŭropaj landoj diris: “Tiom grava estas la malsano de la infano, ni ne respondecos, se li mortos de nia kuraco.” Jen denove ĉerpilo da malvarma akvo verŝiĝis sur la patron malfeliĉan. Poste la patro brakportis sian karan fileton al Matino-hospitalo, en kiu laboris la ĉina kurac-brigado.

Tiam la infano jam estis agonianta. Je la dua horo en la nokto, la tuta membraro de la ĉina kurac-brigado okazigis kunvenon sub lampolumo. Ilin stimulis la instruo de Prezidanto Maŭ “**servu al la popoloj de la tuta mondo**”, la fortega sento de internaciismaj devoj kaj la spirito de revolucia humanismo. Kvankam la ekipaĵo de tiu hospitalo tute ne povis kompari kun tiu de Degfar-hospitalo, kaj mankis al ĝi eĉ traĥeoskopo por ekzamenado de traĥeo, sed ili unuanime opiniis, ke savi la vivon de eta Ibrahim estas neforpuŝebla devo por la ĉinaj medicinaj laborantoj. Ili do komencis urĝan savadon.

“Nenia granda malfacilo povas timigi nin!” La membroj de la ĉina kurac-brigado faris decidon venki ĉiujn malfacilojn kaj nepre liberigi la malgrandan Ibrahim de la malsano. En manko de necesaj ekipaĵoj, la kamaradoj de la kurac-brigado du fojojn faris traĥeotomion kaj finfine eltrovis sub la gloto la objekton enirantan en la traĥeon.

Jen saviĝis Ibrahim! Ĉiuj en la operaciejo eksaltis pro ĝojo. Kiam la verda plasta bido, kiu obstrukcis la traĥeon de la infano, estis transdonita en manon de la patro de Ibrahim, ĉi tiu, kun larmoj en la okuloj, forte premis la manojn de la ĉinaj kuracistoj kaj flegistinoj, kaj longe mutiĝis pro ekscitiĝo kaj ne povis eltrovi taŭgan vorton por esprimi sian dankon, kvankam tiumomente tiom da dankemo li sentis.


La ĉina specialisto pacience instruas al zanzibaraj kursanoj la teknikon de putborado.






La ĉinaj specialistoj en Malio laboras kune kun la lokaj popolamasoj. En la foto la ĉina specialisto klarigas al maliaj laboristoj la metodojn de tabakokulturado.

Ĉinaj specialistoj kaj laboristoj de Kongolando (B.) intime kunlaboras tage kaj nokte en konstruado de ŝpinteksejo.



La ĉina specialisto instruas teknikon al gvineaj klasfratoj.



Ĝojigaj Novaĵoj sur la Industria Fronto de Ĉinio

EN la varma respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton**”, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj en nia lando kun senlima entuziasmo kaj energio impetas en la praktiko de revolucio kaj produkta lukto kaj jam produktis grandegan materian forton. Komenciĝis nova situacio de ĉiufanka antaŭensalto en produktado kaj altrapida disvolviĝo de tekniko.

KVINCIFERA VOLTMETRO

La kvincifera voltmetro estas novtipa preciza instrumento, kiu aperis eksterlande en la lastaj jaroj kaj estas grava kaj vaste uzata en la aŭtomatigo de industria produkto kaj nacidefenda konstruado. En 1964, la revoluciaj laboristoj kaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj de la Pekina Radia Instituto kaj ĝia eksperimenta fabriko komencis studi kaj provfari tiun ĉi novan produktaĵon. Sed, pro la malhelpado de la reviziisma kliko de la malnova Partia Komitato de Pekino, multaj problemoj restis tiam nesolvitaj kaj longe ne eblis, ke la produktaĵoj fabrikiĝus en servo al la konstruado de la lando.

Dum la granda proleta kultura revolucio, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de tiu eksperimenta fabriko en varma respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton**” decideme rompis la malnovan sistemon kaj rutinajn regulojn, kiuj estis malutilaj al la produktado, kaj starigis novan revolucionan laborordon, kiu konformas al la disvolviĝo de la produktado, tiel ke la unua grupo da kvinciferaj voltmetroj eliris el la fabriko en mallonga tempo.

52-METRAJ ŜTALRELOJ

En la granda proleta kultura revolucio, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**teni la**

revolucion, stimuli la produkton”, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio lastatempe produktis por la ŝtato la unuan aron de 25-metraj ŝtalreloj en nia lando. Tio markas ke la teknika nivelo de nia ŝtalrela produktado jam iris inter la progresintajn vicojn de la mondo.

La pogranda produktado de 25-metraj ŝtalreloj havas grandan signifon por la konstruado de fervojoj en nia lando. Ili povas ne nur plilongigi la vivon de fervojo kaj tiel ŝpari grandkvante ŝtalon kaj investon, sed ankaŭ plialtigi la rapidecon de vagonara veturado kaj la forta transportan kapablon de fervojo.

Neniam antaŭe produktiĝis en Ĉinio 25-metra ŝtalrelo. Tiam ni havas nek la necesajn ekipaĵojn, nek la teknikajn materialojn. Tamen, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**rompi la blindan kredon kaj liberigi la penson**”, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kuraĝe prenis sur sin la taskon de ĝia produktado kaj fine sukcesis produkti la unuan aron da 25-metraj ŝtalreloj por la patrolando, sub la forta subteno de frataj entreprenoj.

NOVTIPA OLEŜTONO

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Tiangin-a Oleŝtona Fabriko post ĉ. dumonata luktado sukcesis provfari oleŝtonon de ekstra kvalito.

Oleŝtono estas necesa frotpolurilo por la pres-tinktura industrio. La presa cilindro, kiun oni uzas por presi desegnaĵon, devas esti polurigita per oleŝtono antaŭ gravurado de desegnaĵo. En la pasinteco ĝi estis dumlonge importata el aliaj landoj. La sukcesa provfaro de tiu ĉi nova produktaĵo de la Tiangin-a Oleŝtona Fabriko metis finon al la dependeco de importado. La produktita oleŝtono estas provita lastatempe de la uzantoj, kaj montriĝis ke ĝia polura grado jam

atingis la nivelon de la importitaj, kaj ke ĝi havas altan fortecon kaj fortan rezistpovon kontraŭ frotado.

PLIPRODUKTO DE SUBAKVAJ MOTOROJ


La Harbina Fabriko de Malgrandaj Motoroj estas malgranda entrepreno, kiu produktas ekipaĵojn de movfortoj de malgranda tipo uzatajn por irigaciado kaj aliaj celoj en la kamparo. Por pli bone subteni la agrokulturon, tiu ĉi fabriko decidis produkti aron da subakvaj motoroj por profundaj putoj aldone al sia origina tasko de produktado de motoroj. Tiuspeca motoro karakteriziĝas per malpli granda investo sed alta efiko kaj facila instalebleco kaj riparebleco. Ĝi tre taŭgas por uzado en la kamparo.

En tiuj tagoj kaj noktoj, kiam la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj sturmis la produkton de subakvaj motoroj, ili ĉiam kunportis la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kaj konsultis ĝin, kiam ili renkontis malfacilajn problemojn. Ĉe la lasta procedo en kunmuntado de la motoroj, du veteranaj laboristoj trovis baze de sia multjara sperto, ke okazos eble ellaso de oleo, se oni muntos ilin laŭ la origina plano, kaj ke tio povos ne nur damaĝi la agrokulturan produkton, sed ankaŭ





1

bruldifekti la motoron. Ili malfermis tiam la ruĝe brilan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj restudis la instruon de Prezidanto Maŭ servi al la popolo "komplete" kaj "senrezerve". Ili interkonsiliĝis kune kun la teknikistoj kaj post provado de pli ol 260 fojoj, ili fine trovis rimedon por solvi la problemon de ebla ellaso de oleo dum funkciado de la motoroj. Nun tiuj motoroj estas jam liveritaj al la kamparo.



2

1. La proletaj revoluciuloj de la Unua Ŝanhaja Plastafa Fabriko intense laboras por produkti plastan membranon por subteni agrikulturan produkton.
2. La Deka Ŝtata Kotona Ŝpinteksa Fabriko de Ŝanhajo kreis novan rekordon de produktiveco.
3. La revoluciaj laboristoj de la Tria Ferŝtala Uzino de Ŝanhajo kreis plej altan rekordon de taga produkto de ŝtalo.
4. La Unua Fabriko de Aŭtopartoj de Ŝenhi-provinco superplenumis la ŝtatan produktan planon en la unua sezono.
5. "Dongfanghong" ŝarg-motortricikloj produktitaj de la Fuĝoŭ-a Aŭto-Riparejo estas pretaj por ellivero.



Prosperere Floras

Higoŭ-brigado

EN la granda proleta kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de nia plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ, sub la direktado de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, ĉie manifestiĝas prospereco en Higoŭ-a Produkta Brigado, Pingŝungubernio, kiun gvidas Li Ŝunda, tutlanda agrikultura labormodelo. Tieaj vastaj amasoj de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj kaj revoluciaj gejunuloj hakas montojn kaj kolektas ŝtonojn, portas teron per puŝĉaroj aŭ vektoj por ebenigi grundon, riparas ŝtuparkampojn kaj terkulturilojn, pristerkas agrojn kaj sunumas semojn. El ĉio ĉi formiĝas simfonio de **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**.

PRENO SUR SIN DE DU TASKOJ

Prezidanto Maŭ plej fidus, subtenas kaj prizorgas malriĉ-kampanojn kaj malsuperajn mez-kampanojn, kaj tiuj ankaŭ plej varme amas Prezidanton Maŭ kaj plej bone aŭskultas liajn vortojn. En la komenco de la pasinta novembro, Li Ŝunda organizis la vastajn amasojn de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj por studi la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**. Ĉiuj ekscitiĝis ĉe tio. Maljunaj malriĉ-kampanoj Li Dacaj, Vang Ĝouze, Lu Venkjuan k. a., kiuj antaŭe organizis interhelpan grupon kune kun Li Ŝunda, diris sonore en la kunveno: “Plej saĝa kaj plej ĝusta estas la instrukcio de Prezidanto Maŭ. Aŭskultante liajn vortojn, ni fariĝos akra-vidaj kaj klarmensaj kaj neniam perdos la direktan. En la pasinteco, ni organiziĝis kaj pene luktis por funkciigi nian kooperativon diligente

kaj ŝpareme, kaj konstruis nian malriĉan montvalon en novan socialisman montvilaĝon riĉan kaj prosperan. Ni certe akiros pli grandan venkon, se ni nun tenas la revolucion kaj stimulas la produkton laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ!”

Tiuj maljunaj malriĉ-kampanoj eldiris tion, kion havas en sia koro ĉiuj malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj en Higoŭ. La sama forta sono eliĝis el iliaj malsamaj buŝoj: Kiuj aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, kaj kiuj plenumos la instrukcion de Prezidanto Maŭ, se ne estas ni? Kion Prezidanto Maŭ diras, tion ni faros. Ŝarĝon pezan je mil ĝinoj ni prenos sur nin kaj dekmilojn da malfaciloj ni supervenkos. Ni nepre kondukos la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino kaj faros la produkton superbone!

Higoŭ ekbolis!

Tiam estis frosta vintro kaj ĉie estis neĝo kaj glacio. La malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj de Higoŭ demokratie elektis Komitaton de Kultura Revolucio kaj starigis du gvidantajn grupojn: unu por teni la grandan kulturalan revolucion kaj la alia por gvidi agrikulturalan produkton. Post prezentado de konsiloj fare de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj kaj demokratia diskutado, oni faris novan planon de vintra agrikultura fundamenta konstruado konstrui longan digon ĉe Nansaj-rivero por transformi 40 muojn da rivermalprofundejo en fekundan kampon.

UNUIĜI KUN KADROJ KAJ EDUKI ILIN POR SINĴETI EN BATALON

Ekbrulis la fajro de revolucio.

Eksonis la klariono de produkto.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “sciu bone ami kaj zorgi la kadrojn”, la malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj de Higoŭ varme subtenis la revoluciajn kadrojn por teni la revolucion kaj stimuli la produkton kune kun ili. Rilate al kadroj farintaj erarojn, ili alprenis la politikon “lerni el la pasintaj eraroj por eviti la estontajn, kuraci la malsanon por savi la homon” kaj varme helpis ilin por ke ili konu siajn erarojn kaj klopodu kompensi la erarojn per novaj meritoj. La malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj opiniis, ke la Higoŭ-aj kadroj estas elkulturitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj harditaj en kamparo kune kun ili. Ili diris: “Ni devas firme aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj bone ami kaj zorgi la kadrojn. Estas nepermeseble lasi la diablojn kaj demonojn konduki la kadrojn al erara vojo, nek lasi tiujn, kiuj havas kaŝitan intencon, forpuŝi ĉiujn kadrojn senescepte kaj sendistinge.”

Fang Ĵenhe, propaganda komitatano de la partia filio de la brigado, fariĝis malsarena en la koro kaj malaktiva en siaj laboroj, ĉar komunumanoj surmurigis dekelkajn opini-afiŝojn kontraŭ li. La malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj meminciate lin helpis varme kaj studis kune kun li la vortojn de Prezidanto Maŭ rilate al la demando, kiel oni traktu siajn erarojn kaj alies kritikojn. Ili ankaŭ faris intiman babilon kun li post la studado. En la komenco, Fang Ĵenhe sentis sin maljuste traktita, opiniante ke kiel kadro li jam faris multe da penoj, sed la komunumanoj tamen surmurigis kontraŭ li opini-afiŝojn nur pro tio, ke li faris iom da eraretoj. Poste, la malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj diris al li: “Bagatela malsano nekuracita fariĝos grava; malgranda eraro nekorektita fariĝos serioza. Ni kritikis kadrojn nur por ke ili ne suriru malĝustan vojon!” La menso de Fang Ĵenhe forte agitiĝis kvazaŭ ondanta maro. Li diris emociite: “Antaŭe pezis sur min egoismo. Mi timis, ke la opini-afiŝoj forbalaos mian prestiĝon, kaj ke la amasoj tenos min en implikeco senfine. Nun mi certe aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj korektos miajn erarojn. Mi rektigos mian talion por teni la revolucion kaj stimuli la produkton kune kun la amasoj.” Antaŭe li estis komisiita prizorgi la laborojn de la kvara produktgrupo, sed li tre malofte iris al ĝi. Nun li ne nur multe klopodis por la laboroj en la kvara produktgrupo, sed ankaŭ meminciate ekprenis en la manoj la laborojn de la kvina produktgrupo.



Komunumanoj de Higoŭ-brigado diligente alportas sterkon al kampoj.

Sub la zorgo kaj helpo de la malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj, multaj el la kadroj en Higoŭ frakasis sian egoismon, starigis en si kolektivismon kaj brave elpaŝis por fari revolucion kaj ekpreni en siaj manoj la produkton.

REVOLUCII ŜPAREME, PRODUKTI DILIGENTE KAJ MALLUKSE

Ĝuste kiam la vastaj amasoj de Higoŭ-aj malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj kaj kadroj tenis la revolucion kaj stimulus la produkton en arda entuziasmo, alblovis de

aliloke nigra vento de ekonomiismo agitanta la kamparanojn "distribui ĉion de la kolektivo kaj formanĝi ĉion". Tiu nigra vento tre rapide ekskuis Higoŭ. Sed, la Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong, je la unua rigardo jam travidis la diablan artifikon de kontraŭrevoluciaj reviziistoj. Ili diris kun indigno: "La kolektiva ekonomio estas nia apogilo. Sen ĝi ne ekzistus niaj nunaj feliĉaj tagoj. Se ni distribuos ĉion de ĝi kaj ĉion forkonsumos, ĉu ni reiros al la malnova vojo de mizero?" Por komprenigi al la amasoj la malutilecon de ekonomiismo, Li Ŝunda kaj maljunaj malriĉ-kamparanoj Lu Venkjuan k. a. organizis la amasojn rememori la historion de la pasintaj pli ol 20 jaroj en la konstruado de la montregiono kaj la diligenta kaj ŝparema funkciigo de la kooperativo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj faris al la amasoj edukon pri revolucia tradicio de diligenteco,



malluksemo, ŝparemo, luktado en malfaciloj, sinapogo sur la propraj fortoj kaj ŝparema kondukado de revolucio. Sonis ĉe ĉies oreloj denove la vortoj, kiujn Li Ŝunda ofte diris: "La luktado en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj estas trezoro, kiun donis al ni Prezidanto Maŭ. Ni devas neniam perdi ĝin por mil jaroj kaj dek mil generacioj. Nia Higoŭ ŝanĝus sian koloron, se ni perdus tiun trezoron. Tio validas same por nia lando."

La instruoj de Prezidanto Maŭ pri lukto en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj igis ilin ne nur firme stari kontraŭ la atako de diabla vento de ekonomiismo, sed eĉ pli multe zorgi pri ŝparemo en revolucio kaj diligenteco kaj ekonomio en produkto. En revolucio, ili ŝparas por la lando kaj kolektivo ĉiun moneron, kiun ili nur povas, kaj firme oponas kontraŭ la luksemo kaj malŝparemo kaj ĉia agstilo de "sinjorido". En produktado, ili estas des pli diligentaj kaj ekonomiemaj kaj absolute ne elspezas monon por aĉeti kion ili povas mem provizi dank' al la propraj penadoj. Skribante opini-afiŝojn ili ne uzas bonkvalitajn paperojn kaj neniam faris gluaĵon per bona faruno por glui opini-afiŝojn. Kiam starigis batalaj grupetoj en diversaj produktgrupoj, iuj volis en la komenco fari por sia grupeto novan flagon. Sed, ekpensinte la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ "**fari revolucion ŝpareme**", ili utiligis malnovajn ruĝajn flagojn kaj reformis ilin en flagojn por la batalaj grupetoj.

En konstruado de la granda digo longa je pli ol 300 metroj ĉe la bordo de Nansaj-rivero, oni bezonis grandan kvanton da melinito por ricevi ŝtonojn per eksplodigo. Por ŝpari monon por la kolektivo, ke ĝi uzu ĝin en okazo de pli grava bezono en la socialisma konstruado, la revoluciaj junuloj de la produkta brigado malfermis sian ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj foje-foje studis la pecojn pri luktado en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj. Venkinte malfacilojn unun post alia, ili fine sukcesis fabriki per siaj propraj manoj meliniton kun forta eksplodpovo.

En la moro de diligenteco, ŝparemo kaj sinapogo sur la propraj fortoj, la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj mem riparigis ĉarojn kaj faris ŝtonborilojn okaze de ilia difektiĝo.

La kadroj de Higoŭ-brigado decidis firme teni revolucion kaj stimuli produkton laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. En la foto Li Ŝunda (ĉarpuŝanta) kaj PLA-ano laboras kune.

Li Ŝunda skribas opini-afişon kun malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Higoŭ-brigado.



Finiĝis la konstruado de la granda digo. Estis ŝparita la sumo de pli ol 1000 juanoj, kiun oni asignis por aĉeti eksplodaĵojn kaj instrumentojn.

La malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Higoŭ, kiuj gravuris la instruojn de Prezidanto Maŭ en sian koron, tiel disvolvis la gloran tradicion de diligenteco kaj ŝparemo kaj sukcesis rezisti la atakon de diablaj vento kaj nebulo, starante pli rektaj kaj pli graciaj en Tajhangmontaro kvazaŭ verdaj, fortikaj pinoj.

BATALI KONTRAŬ MALAMIKA SUBFOSADO

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Post kiam la malamikoj kun armiloj estos ekstermitaj, restos ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, kaj ni absolute ne devas subtaksi tiujn ĉi malamikojn.”**

La granda kultura revolucio estas granda klasbatalo, kaj ĉiuj homoj de diversaj klasoj ludos sian rolon sur la scenejo. Kiam la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Higoŭ tenis la revolucion kaj stimulis la produkton en arda fervoro laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ, ankaŭ la nebone remulditaj bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj aktivigis profitante la okazon. Ili starigis kontraŭrevoluciajn organizojn kaj agitis ĉie la komunumanojn por subfosi la produkton kaj la grandan proletan kulturalan revolucion. La Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj estas armitaj per la granda penso de Maŭ Zedong, absolute ne povas toleri la mensogadon kaj subfosadon de la klasaj malamikoj kaj forte indignis nereteneble. Maljuna malriĉ-kamparano

Li Dacaj tuj elpaŝis dirante: “La partia filio de Higoŭ ĉiam alte tenis la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong en ventoj kaj pluvoj dum la pasintaj pli ol 20 jaroj ekde la periodo de interhelpa grupo ĝis tiu de popola komunumo. Tute egale, kian ajn diablan venton la malamikoj blovas kaj kian ajn sagon ili kaŝe pafas, ni povas travidi ilin je la unua rigardo. Neniu el ili povos eskapi el la feraj manoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.”

La klasaj malamikoj estas stultuloj. Ili ne sukcesis subfosi la revolucion kaj produkton de Higoŭ, sed male, levinte ŝtonon ili frapis per ĝi siajn proprajn piedojn. Ili ludis la rolon de instruisto per negativa ekzemplo por la vastaj amasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Per tio la lastaj instruis la komunumanojn akriigi siajn okulojn kaj la junulojn altigi sian klaskonscion. Ili diris: “Kun la subteno kaj direktado de Prezidanto Maŭ, ni nepre kondukos la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino! Ni nepre ekstermos plene la klasajn malamikojn, se ili aŭdacos paroli aŭ agi senbride!”

FARI PLI GRANDAN STREĈADON POR AKIRI NOVAJN VENKOJN

Profitante la favoran orientan venton de la granda kultura revolucio, la Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj gajnis por si brilan venkon sur la produkta fronto kaj aperis inter ili herooj aro post aro.

Dum la intensa batalo de digokonstruado, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“disvolvi nian**

Kultura Vivo

VILAĜAJ KURACTRUPOJ

En varma respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton**” kaj lia granda direktivo meti la gravitan punkton de sanitara laboro en vilaĝojn, la revoluciaj laborantoj de pekinaj kuracaj institucioj amase aliĝis al vilaĝaj kuractrupoj por servi al la malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la agrikultura fronto.

La unuaj vilaĝaj kuractrupoj konsistantaj el pli ol 570 personoj jam sin direktis al la provincoj Henan, Hubej, Guanghi k.a. en marto ĉi-jare. Poste, ekveturis sinsekve multaj aliaj kuractrupoj al vilaĝoj.



DOKUMENTA FILMO “GRANDA VENKO DE LA PENSO DE MAŬ ZEDONG” PREZENTITA EN OSAKA

Tiu kolora filmo, kiu prezentas la trifojan sukceson de nuklea provado en Ĉinio, estis varme akklamata de progresemluloj en Osaka, Japanio, kiam ĝi estis tie montrata publike la unuan fojon en la 13-a de marto, 1967.

Iu dommastrino nomata Hosoki Mija, kiu vivis iam en Ĉinio antaŭ la Liberiĝo, diris varme post rigardo al la filmo: “La ĉina popolo jam atingis tiom grandan sukceson en la kampo de scienco en nur 17 jaroj post sia liberiĝo, tion ĝi ja dankas al sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.” Kaj ŝi aldonis: “La nukleaj armiloj de Usono estas iloj por mortigi homojn, sed tiuj de Ĉinio estas armiloj por defendi la pacon. Rigardinte la filmon, mi ne sentas timindecon de nuklea armilo, kontraŭe, mi vidas esperon de kompleta detruo de nuklea armilo.”

batalstilon de kuraĝo en batalo, maltime al sinofero kaj laciĝo, kaj kontinua batalado (t. e. senripoze fari sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo)”, la anoj de la milica bataliono prenis la digo-konstruejon kiel militan ekzercejon. Ili eksplo- digis monton por ricevi ŝtonojn en tago kaj konstruis la digon nokte. La pli ol cent milicanoj estis viglaj kaj energioplenaj kvazaŭ drakoj kaj tigroj. Iu opiniis, ke estas tre malfacile labori pri la firma roko kaj malmola grundo. Sed la milicanoj diris: “Firma estas la roko, sed ne tiom, kiom nia revolucia volo; kaj malmola estas la grundo, sed ne tiom, kiom nia proleta ostaro. Ni timas nenian malfacilon, konstruante digon por socialismo!” Baza milicano Ĝang Pingfan sin jetis ĉien, kie troviĝis plej grandaj malfaciloj aŭ plej penigaj laboroj. Vidante, ke liaj ŝultroj ŝveliĝis kaj liaj okuloj ruĝiĝis pro laborado ĝis profunda nokto, oni konsilis lin iom ripozi. Li levis sian ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj diris: “Vidu! Kun ĝi mi ekhavas saĝon kaj energion, ke mi forgesas laciĝon kaj estas nesubpremebla de malfaciloj.” Oni admonis al milicanino Ĝang Gian-e, ke ŝi ĉesu porti ŝtonojn por konstrui digon, kaj ke sufiĉas al ŝi porti teron kaj ebenigi la grundon. Sed ŝi diris: “Mi bedaŭros dum mia tuta vivo, se en la granda digo de socialismo ne troviĝus ŝtonoj de mi metitaj.” Per uragana sturmado 69 personoj el la milica bataliono finkonstruis la digon, longan je 340 metroj, nur en 45 tagoj, anstataŭ en 60 tagoj per 80 homoj kiel fiksate en la originala plano.

En la arda tajdo de terportado kaj grundoebe- nigado, komunumanino Ma E-ze ĉiutage ellitiĝis en frua mateno kaj iris la vojon de pli ol 3 lioj trans montoj kun *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la sino kaj manĝajsako en la mano por veni al la riverbordo kaj ebenigi la teron.

La Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj profunde komprenas, ke en la printempa sezono, dum kiu ĉiu momento valoras kiel oro, “tempo signifas grenon”. Ekde la lasta vintro ĝis la nuna printempo, kun la revo- lucia energio de “vipado al rapida ĉevalo sen deseliĝo”, ili konstruis la digon, ebenigis la grundon, kolektis sterkon, sunumis bonspaciajn semojn kaj riparitis terkulturilojn. Unuvorte, ili faris alian paŝon tuj post la antaŭa, ke la preparado de printempa plugado estis solide plenumita. Nova granda ŝtondigo stariĝis, 40 muoj da kampoj ĉe riverbordo sukcese ebeniĝis, kaj la sterko estas plejparte portita al la kampoj. Vidante vicon post vico da ŝtuparaj kampoj kun dika tertavolo kaj sufiĉa sterko, oni diris kun plena konfido: “Ni pli energie daŭrigos niajn klopodojn por akiri abundan rikolton en la nuna jaro.”



La dek heroaj maristoj, kiuj helpis Vjetnamion en ĝia batalo kontraŭ la usona agreso.

Batalo sur la Bak Bo Golfo

HINMIN

LA milita fajro sur la Bak Bo Golfo altiras la zorgemon de la popoloj tutmondaj.

La marakvo de la Bak Bo Golfo formas intiman kaj amikan interligon de karno kaj sango inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

En la 28-a de aŭgusto, 1966, du malgrandaj ŝarĝoŝipoj n-roj 1018 kaj 1019, kun flirtantaj nacistandardoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj plene ŝarĝitaj per la amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj, ekveturis de la haveno de la patrio en la ĝojkrioj "Vivu Prezidanto Maŭ!" kaj direktiĝis al Vjetnamio, kiu nun entreprenas heroan nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo.

Sur la furioza maro, n-ro 1018 iris antaŭe dum n-ro 1019 ĝin sekvis. Rompante la ondojn kaj venton, la du ŝipoj sin puŝis antaŭen al la celita haveno.

Kun brula malamo kontraŭ la usona imperiismo kaj arda amo al la vjetnama popolo en la brusto, la ŝipanoj firme tenis en sia memoro la instruon de Prezidanto Maŭ, kiun ili fojon post fojo laŭtlegis antaŭ la ekveturo:

"La popolo de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popolo de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, timu neniajn malfacilojn kaj marŝu antaŭen, unuj sekvante aliajn; tiam, la tuta mondo certe apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj."

La ŝipoj estis veturantaj antaŭen per alta rapideco. La luno jam leviĝis el la maro, kaj ĉie tremis arĝenta brilo. Sur la stirejo kolektiĝis Ĉen Jongŝang, politika komisaro, Ĉen Dajing, direktanta ŝipestro, kaj

Huang Busan, ŝipestro. Ili jen levis siajn binoklojn, plenatente rigardis malproksimen kaj zorgeme observis la surfacon de la maro, jen klinis sin por rigardi la marmapon kaj la direkton, montritan de la kompasoj. La ŝipanoj vigle laboris sur siaj postenoj. Refoje la deĵoranto mezuris precize la pozicion de la ŝipo. La ŝarĝoŝipo n-ro 1018 estis veturanta antaŭen laŭ la normala navigacia linio en la okcidenta parto de la Bak Bo Golfo.

Subite vidiĝis du lumigaj bomboj rekte en la antaŭo. La deĵoranta veturigisto signalis averton pri batalo.

Ĉiuj homoj sur la ferdeko singardeme rigardis la noktitan ĉielon. Iliajn orelojn atingis obtuza bruo de aeroplanoj el super la maro.

“Kamaradoj, estu singardemaj kaj pretaj por batalo! Pluen laŭ la difinita linio.”

SANGE BATALI KONTRAŬ LA MALAMIKO ĜIS LA FINO

30 minutojn post la 1-a en la 29-a de aŭgusto, sinsekve ĵetitaj lumigaj bomboj faris la maron tiel hela kiel en la tago. Du rabistaj aeroplanoj de Usono sin direktis malsupren rekte kontraŭ la ŝarĝoŝipojn kun akra bruo, obusoj de maŝinapilegoj kaj bomboj eksplodis flanke de la ŝipoj kaj levis altajn kolonojn de akvo.

Meze de la surdigaj eksplodoj la megafonoj elsendis la klaran, firman kaj aplomban voĉon de la politika komisaro Ĉen Jongŝang:

“Kamaradoj, jen estas momento de provo por ni. La granda Partio kaj la granda Prezidanto Maŭ estas kune kun ni. Ni nepre batalu ĝis la fino!”

La voĉo kun flamanta batalpasio estis plena de malamo kontraŭ la malamiko, amo al la patrio kaj memfido pri akiro de venko.

La ŝarĝoŝipoj, sur kiuj flirtis la ruĝaj standardoj kvinstelaj, mem estas sankta teritorio de la patrio. La ferdeko estas la fronta pozicio por helpi vjetnamion kaj rezisti kontraŭ la usona imperiismo. La granda penso de Maŭ Zedong estas potenca armilo, per kiu ni venkos la usonajn rabistojn. Ni povas oferi niajn vivojn, sed la digno de la patrio ne povas esti ofendita.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: “Ni, la ĉina nacio, havas la spiriton fari sangan batalon kontraŭ la malamiko ĝis la fino, la firman decidemon por reakiri nian perditan teritorion sur la bazo de nia propra penado kaj la kapablon mem stariĝi inter la nacioj de la mondo.”

La direktanta ŝipestro Ĉen Dajing, kiu majeste staris sur la stirejo, sekvis la malamikajn aeroplanojn per kolera rigardo, senĉese donis ordonojn pri ŝanĝo de la veturdirekto kaj gvidis la ŝarĝoŝipojn agi lerte kaj adaptiĝeme kontraŭ la bombado kaj pafado de la malamikaj aeroplanoj.

La dua oficisto Lin Jong, kiu manipulis la direktilon, rapidege turnis la stirilradon per sia tuta forto. La ŝipo abrupte turniĝis dekstren. La malamiko maltrafis sian celon kaj la bomboj falis en la maron.

Post du minutoj la malamikaj aeroplanoj denove eklonĝis. Ree la ŝipo abrupte turniĝis, rapidege veturis maldekstren kaj sukcesis eviti ilian pafadon.

Tiamaniere la heroo ŝarĝoŝipo n-ro 1018 kuraĝe luktis kontraŭ la malamikoj sur la vasta maro, kvazaŭ

ŝtormobirdo meze de tempesto, kaj fojon post fojo evitis la pafadon de la malamikaj aeroplanoj.

Ĝi trapasis la densan pluvon de kugloj kaj veturis antaŭen kun triumfo rompante la ondojn.

Alterne la usonaj rabistaj aeroplanoj bombadis kaj pafadis pli ol unu horon. En la fino ili forflugis malesperigite.

Sed la ŝipanoj sciis, ke la barbaraj, ruzaj malamikoj ne ĉesos kun siaj atakoj, kaj pli akra batalo baldaŭ okazos.

Post pli ol 30 minutoj, pli multe da malamikaj aeroplanoj alflugis unu post alia. Ili faligis malsupren ĉirkaŭ la ŝarĝoŝipojn aron kaj aron da lumigaj bomboj en la sama momento.

Nun brilis granda fajrolumo inter la maro kaj la ĉielo. Obusoj de maŝinapilegoj, bomboj kaj raketoj ŝutiĝis kontraŭ la ŝarĝoŝipo n-ro 1018 kvazaŭ torenta pluvo.

Jen! Sub la plonĝatako de la malamikaj aeroplanoj, meze de la eksplodo de la raketoj kaj en la leviĝantaj fajroj kaj fumo la ĉefa oficisto Hie Ĵuju, kiu estis vundita, brave staris sur la ferdeko kaj direktis la batalon kontraŭ la fajro. La komunisto kaj ĉefmaristo Huang Dajaŭ saltis en la holdon plenan de fajro kaj fumo kaj estingis la leviĝantajn flamojn kune kun k-do Li Dacaj kaj Huang Ĝuo-en.

La radiotelegrafisto Huang Vejĉaŭ aplombe manipulis la klavon kaj alvokis la radiostacion de la patrio per la plej alta rapideco kaj la plej akurataj signaloj: “Ekspresa depeŝo, ekspresa depeŝo...”

Subite, krak! la klavo saltis alten. Okazis fortega skuigo. Fajro kaj fumo leviĝis sur la antaŭa ferdeko. Poste aŭdiĝis bruo de eksplodo. La anteno rompiĝis. Densa fumo vualis la ŝipon.

La maŝinholdo estis trafita de kugloj. La 19-jara KJL-ano (KJL = Komunisma Junulara Ligo) Vang Hing enkuris en ĝin kaj elportis la grave vunditan komuniston Vu Kin sur la ferdekon, per sia tuta forto sin levante laŭ la ŝtuparo.

La komunisto Li Dacaj, en la sekundo de la eksplodo de raketo, tuj ĵetis sin al vundito apud li. Tiu ĉi heroo, kiu transfluigis la penson de Maŭ Zedong en sian animon, defendis la sekurecon de la klasfrato per sia vivo.

Sur la stirejo leviĝis densa fumo. La direktanta ŝipestro Ĉen Dajing kaj la ĉefmaristo Huang Dajaŭ estis ĵetitaj de la aerondo de la eksplodo en la maron. La ŝipestro Huang Busan, manipulanta la stirilradon, grave vundiĝis kaj lia kranio krevis. Kiam li reakiris sian konscion, la unua ideo, kiu fulme venis al li en la kapon, estis: Ekveturigu. Per miriga firmvolo li tuj stariĝis sur la planko kun sango sur sia korpo kaj, firme tenante la radon, laŭte kriis: “Je alta rapideco!”

Sed la maŝinaro difektiĝis. La stirilrado ĉesis funkcii. La korpo de la ŝipo serioze kliniĝis flanken. Alo de la helico aperis sur la surfaco de la akvo.

Estu fortranĉita la kapo kaj fluu la sango, sed la penso de Maŭ Zedong ne povas esti forlasita. La radiotelegrafisto Huang Vejĉaŭ prenis la brile ruĝan

Tenante en la manoj la libron Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong donacitan de Ĉefministro Ĝou Enlaj, la direktanta ŝipestro Ĉen Dajing emocie raportas al siaj batalamikoj pri sia ĉeesto ĉe la nacifesta revuo, en kiu li vidis Prezidanton Maŭ.



libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj sin jetis el la telegrafejo. La *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* brilis kvazaŭ fulmo tra la nokta ĉielo super la Bak Bo Golfo, kie kolere tondris.

Muĝis la mara vento. La ondoj trembrilis. Kiam la ŝipo estis baldaŭ subakviĝonta, la politika komisaro Ĉen Jongŝang iris tra la kliniĝanta ferdeko kaj adiaŭis al la martiriĝintaj komunistoj Li Dacaj, Li Cilian, Caŭ Ĝijong, Caj Gintang kaj Vu Kin, kiuj heroe oferis sian vivon.

Poste li elprenis sian notlibron, kaj fronte al la maro li rapide kaj indigne skribis kaj skribis.

Tio, kion li skribis, estis manifesto kondamnanta la monstrajn krimojn de la usona imperiismo: Kiu ŝuldas sangon, devas repagi per sango. La usonaj rabistoj nepre estos duoble punataj pro siaj krimoj!

Tio, kion li skribis, estis poemo pri la alta nobleco kaj heroeco de ĉinaj gefiloj de la epoko de Maŭ Zedong: La herooj ĉiam vivos en la koro de centoj da milionoj da popolanoj, kaj ilia eterna vivo batalos en la Bak Bo Golfo!

La ŝarĝoŝipo n-ro 1019 difektiĝis.

La ŝarĝoŝipo n-ro 1018 subakviĝis. La politika komisaro Ĉen Jongŝang estis la lasta, kiu ĝin forlasis.

La ekstreme barbaraj usonaj aeroplanoj denove venis por spuri kaj daŭre persekuti niajn vunditajn ŝipanojn.

Sur la vasta maro la ŝipanoj ne plu aŭdis la voĉon de la politika komisaro, kvankam ili ankoraŭ vokadis lin.

En la antaŭvespero de la ekveturo la politika komisaro serioze instruis al siaj filoj, ke ili estu daŭrigantoj de la revolucia afero. Li diris al ili: "Mi okupiĝas pri transportado sur la maro, kaj mi devas batali kontraŭ la usona imperiismo kaj tajfuno. Ne estas batalo sen vivofero. Ĉu vi timas?" La infanoj respondis: "Ni ne timas. Kiam ni estos plenkreskaj, ni, same kiel vi, servos al la popolo. Ni fariĝos bonaj infanoj de Prezidanto Maŭ."

Rememorante la martirojn, ĉiuj kamaradoj ne povis deteni sin de larmado. Ili pensis, ke la usona imperiismo dronigis ilian ŝipon, sed ĝi ne povas detrui la penson de Maŭ Zedong en ilia kapo, nek ŝanceli ilian volon kaj decidon helpi Vjetnamion kaj kontraŭbatali la usonan imperiismon. Ili ĉiuj transformis sian aflikton en indignon kaj sian malammon en forton, kaj naĝis al proksima insulo.

La direktanta ŝipestro Ĉen Dajing kaj la komitatano de la partia filio Huang Dajaŭ, kiuj estis en la maron puŝitaj de aerondo de la eksplodo, naĝis al la surfaco de la maro, kaptis savzonon flosantan al ili kaj bandaĝis la vundojn unu por la alia. Recitante vortojn de Prezidanto Maŭ ili naĝis antaŭen per sia tuta forto. Super la ruliĝantaj ondoj sonis la ĉion droniganta voĉo de la penso de Maŭ Zedong.

"Faru firman decidon," unu el ili recitis la unuan frazeron kaj puŝiĝis antaŭen.

"Timu nenian oferon," la alia lin sekvis recitante la duan frazeron kaj naĝis antaŭen tra la ondoj.



Por ebligi al siaj klasfratoj forlasi la dezertan insulon, Liang Huabaū transnaĝis markolon kaj sukcesis starigi kontakton kun la ekstera mondo. En la foto Liang Huabaū kaj Vang Hing studas verkon de Prezidanto Maŭ en la hospitalo.

**“Superu ĉiujn malfacilojn,”
“Por akiri venkon.”**

En la sama momento, aliloke sur la maro ok kamaradoj, kiuj enmariĝis pli aŭ malpli frue, estis puŝantaj per sia tuta forto malgrandan savfloson, sur kiu kuŝis la ŝipestro Huang Busan senkonsciiginta.

Pluvnebulo vualis la maron. Malvarmega matena vento tremigis ilin, kaj iliaj kruoj senĉese konvulsiis. Post kelkaj horoj da luktado en la maro ili ne plu havis forton por antaŭenpuŝiĝi, kiam ili estis ĉirkaŭ du kilometrojn for de la insulo.

Nun du malamikaj aeroplanoj preterflugis malalte super la marsurfaco. En tiu ĉi grava momento la brila figuro de Prezidanto Maŭ naĝanta en Jangzi-rivero prezentiĝis antaŭ iliaj okuloj.

Tuj ili kvazaŭ vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ alvokanta al ili. Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ, ni certe antaŭenpuŝiĝos vin sekvante tra ĉiuj ventegoj kaj ondegoj.

DEZERTA INSULO NE TIMIGIS LA HEROOJN

La ruĝa suno leviĝis el la oriento. Puŝiĝinte tra kugloj kaj obusoj de la malamikoj, rompinte milojn kaj milojn da ondegoj kaj post longa batalado, dek unu heroaj ŝipanoj venke alteriĝis sur malgrandan insulon de Vjetnama Demokratia Respubliko unu post alia en malsamaj lokoj iom post la deka en la 29-a de aŭgusto.

La insulo estis tute senhoma. Ĉie troviĝis elstaraj rifoj, krutaj rokoj, pikaj dornarbetoj kaj densaj sovaĝlianoj kaj arbustoj.

Tie ne troviĝis manĝaĵoj, nek trinkebla akvo, nek vestoj, nek medikamentoj. La vundoj, malsato, malvarmego kaj ankaŭ la moskitoj kaj formikegoj suferigis la ŝipanojn en ĉiu momento.

La barbaraj usonaj aerrabistoj daŭre ilin spuris kaj serĉis, kaj pafis kaj bombis la dezertan insulon. . .

La heroaj ŝipanoj ree frontis al grava provo.

“En tempo de malfacileco, ni kamaradoj devas vidi atingajojn, devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon.”

La ŝipanoj laŭte recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ. Nun ili pli profunde ol iam ajn sentis la senkomparan potencon de la instruo de Prezidanto Maŭ. La granda penso de Maŭ Zedong estis por ili pli grava ol manĝaĵo, kiam ili estis malsataj; pli varma ol fajro, kiam ili sentis malvarmon, kaj pli efika ol medikamento, kiam ili suferis de siaj vundoj.

La komunistoj ĉiam staras sur la plej antaŭa fronto de la batalo. Posttagmeze de la sama tago ili okazigis kunvenon de la partia grupo. Poste komenciĝis kunveno de la ŝipanoj sur tiu dezerta insulo. Kun ekscitiĝo la direktanta ŝipestro Ĉen Dajing diris:

“Kamaradoj, la bombado de la malamiko ne timigis nin, nek la ventoj kaj ondoj povis malhelpi nin. Ni jam venkis!”

Ĉiuj kamaradoj konkure parolis. Huang Dajaŭ, la komitatano de la partia filio, diris:

“Kvankam ni nun estas sur la dezerta insulo, tamen ni ne estas izolitaj. Post nia dorso estas sepcent milionoj da popoloj de la patrio, kaj antaŭ ni estas tridek milionoj da popoloj de Vjetnamio. Ni certe revenos al la patrio kaj al Prezidanto Maŭ.”

La ŝipanoj estis kuraĝaj batalantoj antaŭ la malamikoj kaj fervolaj herooj antaŭ la malfaciloj. Kiam ili havis nenion por trinki, ili trinkis la pluvakvon en la kavoj inter ŝtonoj. Kiam ili havis nenion por manĝi, ili serĉis sovaĝajn fruktojn en la arbaro kaj kolektis ostrojn sur la marbordo. En ekstreme mizeraj kondiĉoj, ili estis plenaj de alta revolucia optimismo. Ili bonhumore diris: “Ni havas bongustaĵojn ne nur el la sovaĝejo sed ankaŭ el la maro. Nun ni povas konduki longdaŭran militon kontraŭ la malamikoj.”

Noktiĝis. La mara vento alblovis ĝisostan froston. Kovrante sin per branĉoj kaj folioj, ili dormis sidante duope aŭ triope sur la tero en la arbaro dorso kontraŭ dorso, por reciproke varmigi sin per la varmo de sia propra korpo.

“Nun ni plej bezonas aŭdi la voĉon de la patrio, la voĉon de Prezidanto Maŭ.”

“La plej granda deziro en mia vivo estas vidi la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ.”

Prezidanto Maŭ, estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, vi similas al la matena suno, kiu brilas super la tuta mondo. En tiu ĉi momento ni estas milojn da kilometroj for de vi, tamen via senlima brilo lumigas la vojon de nia batalo.

Patrio, kara patrio! Patrio antaŭenmarŝanta en la alta tajdo de la granda kultura revolucio! En tiu ĉi momento centoj da milionoj da popoloj, plenaj de entuziasmo, estas batalantaj kaj laborantaj sur via vasta tero, kaj ĉie bolas nova vivo. Nun ĉiuj ne plu povis retenigi sian emocion kaj ekkantis sian plej amatan kanton *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktlisto*.

La laŭta kanto transflugis la densan arbaron kaj la oceanon, kaj ŝvebis super la Bak Bo Golfo.

Ĝuste kiam ili estis kantantaj kaj babilantaj, denove alflugis malamikaj aeroplanoj kaj ĵetis bombojn sur la insulo. En tiu minuto la heroa vjetnama popolo sur la ĉeftero kontraŭ la insulo reatakis la usonajn aerrabistojn per fortega pafado. Unu el la aeroplanoj diskrevis kaj falis kun longa trenaĵo de fajro kaj fumo.

“Bonege! Bonege!” ĉiuj tuj manklakis kaj ĝojkriis.

Fronte al la militfajro ili pliintensigis sian malamon kontraŭ la malamikoj. Huang Dajaŭ, la komitatano de la partia filio, diris:

“Se la malamikoj venos, la ŝtonoj kaj lignobastonoj servos kiel niaj bataliloj, kaj la arbaro sur la insulo servos kiel batalejo, en kiu ni kondukos gerilan militon kontraŭ la malamikoj.”

“Jes, ni devas batali kontraŭ la malamikoj ĝis la fino,” diris la aliaj kamaradoj.

En la profunda nokto la ondoj plaŭdis kontraŭ la rifoj ĉe la marbordo. La komunisto Liang Huabaŭ kaj la radiotelegrafisto Huang Vejĉaŭ, surhavante foliojn sur siaj nevestitaj trunkoj, atentostreĉe gardostaris sur la insulo. Ili preferis deĵori pli longe ol vekti la aliajn kamaradojn, kiuj estis en profunda dormo.

La ŝipestro Huang Busan, kiu kaŝiĝis en alia montkavo, suferis de 35 vundoj kaj troviĝis en vivdanĝero. Tamen li ankoraŭ zorgis pri la aliaj kamaradoj kaj pri la patrio. Li eklaboris sur la maro kiel infanlaboristo ĉe fiŝista tirano, kiam li estis dekdujara. Estis la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj savis lin de lia ekstrema mizero kaj edukis lin tiel, ke li kreskis de ordinara fiŝisto en ŝipestron. Tiu ĉi heroo de la tipo de Maj Hiande faris sur la dezerta insulo obstinan lukton kontraŭ vundoloro, malsato kaj malvarmego per miriga sistemo kaj forta malcedemo sub la prizorgo de siaj kamaradoj. Kiam li vekigiĝis dum la bombado de la malamikaj aeroplanoj, li kuraĝigis sin dirante:

“Kara Prezidanto Maŭ, ni certe persistos malgraŭ ĉia barbara agado de la malamikoj.”

TRANSNAĜADO DE MARKOLO SPITE DE VENTEGO KAJ ONDEGOJ

Kiel foriri de la dezerta insulo? Kaj kiel reveni al la kara patrio? La sola rimedo estis transnaĝi al la granda insulo kontraŭa por starigi kontakton kun la vjetnama popolo.

Inter la dezerta insulo kaj la granda insulo kuŝis markolo larĝa je dek kilometroj. Tie la tajdoj, kiuj ne fluis laŭ fiksita direkto, la ŝarkoj, kiuj jen aperis jen malaperis, kaj la aeroplanoj de la malamikoj, kiuj konstante ŝvebis en la aero, ĉiam minacis la vivon de la naĝantoj.

La granda maro ne povis malhelpi la sentimajn kuraĝulojn, kaj la teruraj ondegoj ne povis konkeri la noblan

La ŝipanoj persistas en kolektiva studado de la “tri malnovaj artikoloj” de Prezidanto Maŭ en la hospitalo.



volon de la revoluciuloj. En la oreloj de la komunisto Liang Huabaŭ sonis la voĉo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: "En ĝusta loko ni mortas, se ni mortas por la popolo." "Jes, nun estas tempo por oferi min al la revolucio." Kiam li pensis pri tio, tuj bolis lia sango. Li ekiris al Huang Dajaŭ, la komitatano de la partia filio, kaj diris decideme:

"Bonvolu doni al mi permeson naĝi transen kaj kontakti kun la vjetnama popolo."

La KJL-ano Vang Hing ne estis lerta naĝanto, sed li havis la koron por ekskluzive kaj senrezerve servi al la popolo. Li diris: "Mi ne estas grave vundita, do estas mi, kiu devas iri."

Oni decidis, ke ili ambaŭ kune iru trans la maron, por ke ili povu helpi unu la alian. Je la oka en la mateno de la 30-a de aŭgusto la du bravuloj startis. La aliaj kamaradoj venis al la marbordo por adiaŭi ilin.

"Kamaradoj, ni deziras, ke vi superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."

"Estu trankvilaj. Ni estas komunisto kaj KJL-ano, kaj ni ĵuras, ke ni plenumos la taskon malgraŭ ĉiuj malfaciloj, eĉ se ni devos morti."

Ili sinpuŝis antaŭen tra la ondoj. Vang Hing, kiu estis malpli forta, decidis disigi de Liang Huabaŭ por ne kaŭzi daŭran malhelpon al li. En la antaŭtagmezo de la sekvinta tago, rezulte de elĉerpiĝo de la forto, Vang Hing estis puŝita de la tajdo returnen al la dezerta insulo.

La aliaj ŝipanoj, kiuj restadis sur la insulo, atendis unu tagon kaj unu nokton, sed ne trovis signalon de Liang Huabaŭ pri sukcesa transnaĝo. En la mateno de la 31-a ili decidis sendi aliajn kamaradojn transnaĝi la markolon.

Huang Vejĉaŭ, Huang Ĝuo-en, Ĉen Dajing, Huang Dajaŭ, Hju Gjunĵuj kaj Hiong Jaŭĝang eknaĝis en apartaj grupoj tra la ondoj.

La tajdoj, kiuj ne fluis laŭ fiksita direkto, disigis la kamaradojn transnaĝantajn. Iuj el ili estis puŝitaj returnen al la deira insulo, unu el ili estis forportita al alia dezerta insulo kaj la komunisto Hiong Jaŭĝang oferis, en la ventego kaj ondegoj, sian vivon por sia patrio.

Dum tiu ĉi transnaĝado Huang Ĝuo-en estis forportita al dezerta insuleto en la okcidento post 15 horoj da luktado kontraŭ la ondoj. En la daŭro de kvin tagoj kaj kvin noktoj li obstine batalis sur tiu insuleto. Ne havante manĝaĵojn, li englutis plenbuŝon post plenbuŝo da folioj, kiujn li rulpemis per siaj manoj ĝis dispecigo, imitante la ekzemplon de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo. Li amasigis sian plej grandan kuraĝon kaj provis transnaĝi kelkajn fojojn. Kvankam li ne sukcesis, tamen ne ŝanceliĝis liaj decido kaj kredo pri sia reveno al la patrio. En la 5-a de septembro, t. e., en la oka tago post lia forlaso de la ŝipo, la vjetnamaj popoloj, kiuj iris serĉi lin, trovis lin, ĝuste kiam li estis preta transnaĝi por la kvara fojo.

NEFORGESEBLA AMIKECO INTER LA ĈINA KAJ VJETNAMA POPOLOJ

Luktinte tutan tagon en la 30-a de aŭgusto, Liang Huabaŭ atingis la bordon de la granda insulo iom post la 9-a horo vespere. Li svenis sur la strando antaŭ sia supreniro, kaj kiam li rekonsciigis, li jam ne plu havis

la forton ekstari. Li povis nur antaŭengrimpi unu paŝon ĉiufoje, kiam la ondoj puŝis lin. Tiamaniere li suriris la strandon, kaj li trovis vjetnamajn armeanojn kaj popolanojn en la sekvinta tago.

La rakonto pri la heroa batalo de la ĉinaj ŝipanoj kontraŭ la malamikaj aeroplanoj, malsato, vundo kaj la granda maro rapide disvastiĝis tra la insulo. En la vespero de la sama tago la vjetnamaj armeanoj kaj popolanoj veturis al la dezerta insulo per boatoj por akcepti siajn batalamikojn kaj fratojn, kunportante manĝaĵojn kaj medikamentojn kaj riskante la minacon de ĉirkaŭflugantaj malamikaj aeroplanoj.

Kiam la ĉinaj kaj vjetnamaj fratoj renkontiĝis sur la insulo, la vjetnamaj kamaradoj tuj demetis siajn vestojn kaj ŝuojn kaj donis ilin al la ĉinaj kamaradoj. La milicianoj malligis siajn kaptukojn kaj surmetis ilin sur la ŝultrojn de la ĉinaj kamaradoj. La medicinaj laborantoj denove bandaĝis iliajn vundojn kaj faris urĝan kuracon. La grupestro diris al la ĉinaj kamaradoj kun ekscito:

"Ĉinaj kamaradoj, vi alvenis al Vjetnamio, same kiel al via propra hejmo. Vi faris sinoferon por la vjetnama popolo. Vi estas vere kuraĝaj!"

La karno-sanga amikeco de la vjetnamaj kamaradoj varmigis la koron de la ĉinaj ŝipanoj kvazaŭ varma fluo. Ĉen Dajing ne povis reteni sian internan emocijon kaj ekkantis la vjetnaman kanton *Liberigi la Sudon* en la vjetnama lingvo. Tuj la vjetnamaj kamaradoj kunkantis.

La kantado ekscitis la koron de la heroaj gefiloj de Ĉinio kaj Vjetnamio kaj pleniĝis per ilia frata batalamikeco.

En la internlando de Vjetnamio la ŝipanoj de la ŝarĝoŝipo n-ro 1018 kaj tiuj de n-ro 1019, kiu venke atingis la celitan havenon, ricevis intiman konsolon de la respondeculoj de la vjetnama loka registaro, kaj la vunditoj estis bone prizorgitaj kaj kuracitaj. Kaj reprezentanto de la Ĉina Ambasadorejo speciale venis de Hanojo kaj transkomunikis al ili la prizorgon de Prezidanto Maŭ kaj la popolo de la patrio. Vjetnamaj kamaradoj okazigis por ili akceptan kunvenon plenan de entuziasmo, kaj ili diris laŭdante la ĉinajn ŝipanojn:

"Vi vere meritas la nomon de bonaj batalantoj nutrataj per la penso de Maŭ Zedong, kaj bonaj filoj de la ĉina nacio. Sub la subteno de la ĉina popolo kaj la popoloj de la tuta mondo, la vjetnama popolo certe akiros la finan venkon en sia nacisava afero kontraŭstaranta la usonan imperiismon!"

La reprezentanto de la ĉinaj ŝipanoj esprimis varmegan dankon al la registaro kaj popolo de Vjetnamio pro ilia prizorgo. Li diris:

"Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke helpi Vjetnamion rezisti la usonan imperiismon estas internaciisma devo, kiun ni devas plenumi. La vjetnama popolo estas heroa popolo, kaj la vjetnama nacio estas heroa nacio. Ni firme subtenas la vjetnaman popolon por konduki ĝis la fino la justan nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo, ĝis kiam ĉiuj usonaj agresantoj estos forpelitaj el la teritorio de Vjetnamio."

La granda ĉina popolo ne povas esti humiligita. Ĉiuj sangoŝuldoj de la usona imperiismo al la ĉina popolo nepre devas esti pagitaj!

Ĉiam pli Ardas la Fajrego de Armita Batalo de la Tajlanda Popolo

DES pli potenciĝas la armitaj fortoj de la tajlanda popolo, ju pli ili batalas kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ili frakasis la multfojnajn, grandskalajn "ĉirkaŭatakojn" fare de la malamikoj unu post alia. La brila venko de la armitaj fortoj de la tajlanda popolo donas rektan baton al agresa plano de la usona imperiismo, kiu intense plivastigas la hindoĉinan militon, kaj al la krima regado de la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj super Tajlando.

USONA IMPERIISMO ESTAS MORTA MALAMIKO DE LA TAJLANDA POPOLO

Tajlando situas en la mezo de la Hinduĉina Duoninsulo, limtuŝas Laoson, Kamboĝon, Birmon kaj Malajon, kaj estas proksima al nia lando kaj Vjetnamio. Por agresi Vjetnamion kaj la Sudorientan Azion kaj sieĝi Ĉinion, la usona imperiismo jam delonge faras Tajlandon sia agresa bazloko.

En 1963, enpotenciginte la klikon de Thanom-Prapphas, la usona imperiismo tute senigis Tajlandon je politika kaj ekonomia sendependiĝo kaj ŝanĝis ĝin en sian novtipan kolonion. En Tajlando Usono konstruis pli ol 40 bazlokojn por siaj infanterio kaj mar- kaj aer-fortoj. La aeroplanoj, kiuj deflugas de tie, bombas la Vjetnaman Demokratian Respublikon kaj la liberigitan regionon de Laoso en la tago kaj nokto. La usona agresa armeo, restanta en Tajlando, senbride tiranas kaj okupas sin pri murdo, bruligo, perforto, rabado kaj ĉia ajn krimo. Sub la duobla subpremado de la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj, la tajlanda popolo kondukas ege mizeran vivon. En tiu ĉi lando, kie la burokratkompradora burĝaro kaj la feŭda nobelaro praktikas kunan regadon kaj militan faŝisman diktaturon, 60 elcentoj de la kamparanoj ne havas agron, dum 85 elcentoj de ili dronas en ŝuldoj, kies alta interezo atingas 100 ĝis 300 procentojn.

La usona imperiismo estas la plej kruela malamiko de la tajlanda popolo. Ĝis la fino de la pasinta jaro ĝi perforte okupis pli ol milionon da muoj da tero de la tajlandaj kamparanoj kaj devigis ilin konstrui por ĝi aerodromojn, kazernojn, municiejojn, strategiajn ŝoseojn, ktp.

La tajlanda popolo troviĝas nun en maro de suferoj kaj mizeroj.

KIE EKZISTAS SUBPREMADO, TIE EKZISTAS KONTRAŬSTARO

Por batalakiri al si rajton pri vivado kaj nacian liberigon kaj liberon, la tajlanda popolo decideme prenas

armilojn kaj kondukas vivmortan batalon kontraŭ la usonaj agresantoj kaj tajlandaj reakciuloj.

En la 1-a de januaro, 1965, fondiĝis la Tajlanda Patriota Fronto, kaj ĝi alvokis la patriotan popolon de Tajlando unuigi sin kaj batali por forpeli la usonajn agresantojn, faliĝi la reakcian regadon kaj komplete efektiviĝi la sendependecon, demokration, pacon, neŭtralecon kaj prosperon de Tajlando.

La armita batalo de la tajlanda popolo disvolviĝas de la fajrero al la stepa incendio.

Pli frue, en 1961, la plej severe subpremataj kamparanoj de la nordorienta parto en Tajlando jam levis armilojn por fari kontraŭstaron. La gerila batalo komenciĝis en Na Kae, Nakhon Phanom. Post nelonge la fajro de revolucio disetendiĝis al la vasta nordorienta regiono, kiu konsistas el Udorn, Ubon, Sakon Nakhon kaj Nong Khai. Nun la armita batalo de la popolo jam disvastiĝas tra la tuta suda regiono, kaj la armitaj fortoj de la popolo eĉ aktiviĝas en la meza regiono kun distanco de nur 60 mejloj for de Bankoko, ĉefurbo de Tajlando, rekte minacante la kernan lokon de la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj.

La armitaj fortoj de la tajlanda popolo jam starigis revoluciajn bazojn en la regionoj de Nakhon Phanom, Sakon Nakhon, Ubon, Udorn kaj Surin.

La armitaj fortoj de la tajlanda popolo senĉese gajnis venkojn en sia batalo. Laŭ la statistiko farita en januaro, 1966, ili kondukis pli ol 150 grandajn kaj malgrandajn batalojn kontraŭ la usona imperiismo kaj la kliko Thanom-Prapphas, kaj mortigis kaj vundis pli ol 520 malamikojn, inkluzive de ĉirkaŭ 40 usonaj agresantoj kaj oficiroj de la kliko Thanom-Prapphas sub la rango de majoro. Komence de la kuranta jaro, la batalado des pli oftigiĝas, kaj la armitaj fortoj de la tajlanda popolo akiris novajn venkojn unu post la alia.

La kresko kaj plifortiĝo de la armitaj fortoj de la tajlanda popolo terurigis kaj konfuzis la usonan imperiismon. Kun timo ili laŭte kriis: "Tajlando fariĝos la dua suda Vjetnamio!" Prapphas, vic-ĉefministro kaj "ĉefkomandanto por ekstermi komunistojn" de la reakcia registaro de Tajlando, ankaŭ konfesis malesperigite, ke la "ekstermado" de la armitaj fortoj de la popolo jam "fariĝas des pli malfacila".

LA VENKO APARTENAS AL LA TAJLANDA POPOLO

La usona imperiismo kaj la tajlandaj reakciuloj neniel volas rezigni pri sia malvenko. Nun ili des pli freneze subpremas la revolucian batalon de la tajlanda popolo.

La usona imperiismo jam starigis en Tajlando "Komunan Komandemon de Usono kaj Tajlando" kun usonano kiel komandanto, kaj pere de ĝi rekte kontrolas la tajlandan armeon. Same kiel ĝi faris en suda Vjetnamio, la usona imperiismo sendis "Specialan Trupon" al Tajlando por servi kiel militaj konsilistoj, kondukis sangan "ĉirkaŭatak" kontraŭ la armitaj fortoj de la tajlanda popolo kaj starigis "direktejojn" en diversaj regionoj kaj ankaŭ "memstarajn vilaĝojn" laŭ la modelo de "strategiaj vilaĝoj" en suda Vjetnamio — koncentrejojn en alia formo, kie estas enkarcerigitaj 33,000 familioj de Tajlando kun 200,000 anoj.

En la regionoj, kie aktivigis la armitaj fortoj de la popolo, la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj praktikas barbaran politikon "ĉiun mortigi, ĉion bruligi kaj forrabi"

kaj eĉ grandamase masakras la tajlandajn popolanojn per venena gaso kaj diversaj potencaj kemiaj armiloj.

Sed, ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris, la reakciulaj "diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, en la fina analizo, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli vasta kaj intensa skalo". La subpremado kondukata de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj nun vekas la tajlandan popolon al revolucio. Kunagante la laboristoj kaj studentoj en la urboj de Tajlando jam levigis por batali, kaj en la pasinta jaro plimultiĝis iliaj strikoj aŭ rifuzoj pri vizito al klasoj. Pli kaj pli multe da kamparanoj, laboristoj kaj intelektuloj partoprenis la armitan batalon. Sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando jam formiĝis la demokratia unueca fronto, kiu unuigas ĉiujn kontraŭimperiismajn kaj patriotajn fortojn, kaj ĝi ĉiam pli grandiĝas kaj akiras pli multe da subteno flanke de la popolo. Nun la batalo disvolviĝas kun sia venko.

Tajlando fariĝos alia tombejo, kie estos enterigita la papertigro — usona imperiismo. Malgraŭ ĉia freneza barakto fare de la usonaj kaj tajlandaj reakciuloj, la tridek milionoj da tajlandaj popolanoj certe akiras grandan venkon en la batalo por la liberigo de sia patrio.



LETERO DE NIA LEGANTO G. H. EL SVEDIO

Estas tiel, ke ĉiuj numeroj de *El Popola Ĉinio* estas gravaj kaj interesaj sed tiu nova numero distingiĝas pro tio, ke ĝi prezentas tre gravan materialon pri la kultura revolucio en Ĉinio. Jam Lenin skribis: "Dum la diktaturo de la proletaro oni estos devigataj reeduki milionojn da kamparanoj kaj etmastroj, centmilojn da oficistoj, ranguloj, burĝaj intelektuloj, subigi ilin ĉiujn al la proleta ŝtato kaj proleta gvido, venkadi en ili burĝajn kutimojn kaj tradiciojn", samkiel necesas "... reeduki en longedaŭra batalo sur grundo de proletdiktaturo ankaŭ la proletojn mem. . .".

Sendube daŭra kultura revolucio necesas en ĉiuj landoj senescepte. Mi esperas, ke la tutmondaj markasanoj eluzos la okazon ĉerpi el *El Popola Ĉinio* la tie kolektitajn valoraĵojn por la klasbatalo kon-

dukata en internacia skalo. La proleta kultura revolucio necesas por kontraŭbatali la reviziismon.

Ho, se ni estus en tiu feliĉa stato, ke estus eble efektiviĝi proletan kulturalan revolucion ankaŭ en la kapitalisma Svedio. Ĉi tie la kapitalistaj presorganoj kaj usonaj filmoj edukas la junularon en la spirito de pragmatismo kaj kosmopolitismo kaj identigas popolpotencon kun hitlera diktaturo. Ĉie en la kapitalisma mondo oni karikaturas la veron, senhonte mensogas, falsigas faktojn, rampas en la polvo antaŭ la dio Mamono. Militarismo, junularkrimeco, dekadenco de la moroj, disfalo de la moralo, trivialiĝo, jen la kaŭstikaj tendencoj, kiuj trapenetas la komercan libro- kaj gazet-eldonadon. Sed dank' al la eldonaĵoj, per apliko de Esperanto, el la popola Ĉinio atingas nin grava literaturo el kiu ni povas konkludi spertojn kaj instruojn por la daŭra liberiga batalo. Kiel la ĝenerala sekretario de MEM mi aliĝas al la opinio en la artikolo en *El Popola Ĉinio* pri la sukcesa nuklea eksplodigo fare de Ĉinio. Ĉar Ĉinio estas pacama lando, ĝi uzos la atombombon nur

por sia defendo kontraŭ la imperiistoj kun Usono ĉe la kapo.

SKRIBAS NIA VJETNAMA LEGANTO DINH HUY HAN

Mi entuziasme sciigas vin ke mi ofte observadas la nunan grandan proletan kulturalan revolucion en Ĉinio kiel mian revolucian taskon. Antaŭe kaj poste, mi lernkomprenas kaj varme subtenas tian klasbatalan revolucion. Mi ĉiam opinias ke iuj ajn kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj, kontraŭrevoluciaj specoj kaj eĉ modernaj reviziistoj certe estos forbalaitaj el la progresema bela mondo.

Ĉi-jare, kun la 50 aĝoj, mi persiste studas la ĉinan lingvon samkiel Esperanton kun trankviliĝa koro, ĉar mi klarvidas ke nun la mondo jam akiras la grandan gloran penson de Maŭ Zedong, la direktilon de la proleta revolucio. Krom la internaciaj temoj mi diligente ellernadas ĉiujn verkojn apartenantajn al la nuna revolucio de Ĉinio. Mi neniam forgesas tian senprecedencan revolucion en historio de Ĉinio kaj tenas ĝin kiel sonorilan vekvoĉon singardemantan por defendi la proletan diktaturon.

Du Popolaj Kantoj

Prikanti Unuvoĉe la Grandan Partion

(ĤALĤAZA)

*Kunvivas frate l' popolanoj de l' diversaj nacioj,
Por ĉiam kune, solidare, plenaj de harmonio.
La Kompartio — nia granda patrino
Nutradas la gefilojn de l' diversaj nacioj.*

*Forŝovis ni ŝultro-ĉe-ŝultre l' noktan kurtenon,
Kaj gajnis hodiaŭon de la luma mond'.
Grandpaŝe marŝas ni antaŭen kun kuraĝa mieno,
Tenante alte l' grandan ruĝan flagon de la pens' de Maŭ Zedong.*

*Banante nin en varma brilo de sunradioj,
Ni ĉiam sekvas nian karan Partion.
Kun brust' levita kaj en alta batal-pasio,
Ni marŝas sur la granda voj' de revolucio.*

*Ni unuiĝas firme kiel bloko de roko,
Profundas kiel maro l' amikec' de revolucio.
La pens' de Maŭ Zedong nin nutras en la epoko,
Ni laŭte kantas unuvoĉe pri la granda Partio.*

En la Ora Urbo Pekino

(TIBETA)

*Ho, en la ora urb' Pekino nun,
Leviĝas ora sun',
Ĝi estas ne l' ĉiela sun',
Sed de la pens' de Maŭ Zedong radias ruĝa lum'.*


*Ho, en la ora urb' Pekino nun,
Trembrilas lag' per ora lum',
Ĝi estas ne lagakva lum',
Sed briloj de l' verkar' de Prezidanto Maŭ.*

*Ho, en la ora urb' Pekino nun,
Sonoras ĉielskue kaj majeste klarion',
Ĝi estas ne sonor' de klarion',
Sed voĉ' de Prezidanto Maŭ Zedong.*

La Ministerio de Nacidefendo Honore Titolis Vang Juĉang Modela Soldatamanto

La Ministerio de Nacidefendo de Ĉinio dekretis honori kamaradon Vang Juĉang, proviantiston de iu trupo de la aera armeo de P.L.A. sur la frontlinio en Fugian-provinco, per la titolo Modela Soldatamanto.

De post sia armeaniĝo, kamarado Vang Juĉang ĉiam kreive lernas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultas liajn vortojn, elstarigas politikon, sinforĝese laboras por la Partio kaj metas la revolucion, la laboron kaj la bonon de la aliaj kamaradoj sur la unuan lokon. Laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj kun profunda klasa frateco, li bone prizorgas la batalantojn troviĝantajn en malsano aŭ malfacilo. Li precipe donas atenton al armado de la batalantoj per la penso de Maŭ Zedong kaj helpas por ilia progresado en politiko kaj ideologio. Kvinfoje li savis batalkamaradojn el danĝeroj je kriza momento, sen konsidero pri sia vivsekuro. (Legu la artikolon "Vang Juĉang — Modela Soldatamanto" en n-ro 3, 1967.)



1. Kun la instru' de Prezidanto Maŭ en koro, Kamarado Vang Juĉang, kompartia membro, Elsavis, je vivrisk', batalamikon el danĝero; Li estas, por ni, imitinda bonekzemplo.



2. Ĉe mangrenada ĵetkerc' sur montdeklivo, Parolas Vang Juĉang al la trupanoj siaj: "Se nin atakos la usona imperialismo, Ni nepre ĝin frakasos per grenadoj niaj."



3. El la trupanoj ankaŭ hartondist' laŭ vico Provjetas mangrenadon je l'unua fojo. Pro spertomanko konfuziĝas la novico — Dorsflanken la grenado flugas kontraŭ l' volo.




4. Malsupren ruliĝadas, jen, la mangrenado, Kaj ĝi ekkuŝas tie, kie la skribisto Registas la rezultojn de l' ekzercjetado. Ho, kia danĝereg' al lia vivekzisto!




5. Subite sin aljetas fulme homfiguro — Jen Vang Juĉang per flugrapida salt' impetas. Por sav' de l' kamarad', por lia vivsekuro, Sur glavon monton, en fajrmaron li sin jetas.



6. Li kaptas la fumantan mangrenadon — ho ve, Ekfulmas jam kaj tondras bruo de eksplodo! Gravege li vundiĝis, kuŝas li senmove; Sed la skribist' saviĝis dank' al la klopodo.



7. Tagnokte klopodadis streĉe l' hospitalo, Saviĝis Vang nur post kvar operaciadoj. Senĉese li deliris: "Ĉu el la fatalo Sekure elsaviĝis ĉiuj kamaradoj?"



8. Firmvola l' batalanto de revolucio Ne timas vunddoloron kaj ne malfacilon. Lambastoniri lernas li kun energio Kaj l' man' maldekstra lernas uzi la skribilon.



9. Informiĝinte venis vidi lin l' edzino, Vang Juĉang jene skribis sian kordeziron: "Vivu Prezidanto Maŭ!", kaj l'vortoj de sublimo Ekdisradias en la ĉambro oran brilon.



10. Kunvenas la studentoj de la verkoj de Maŭ Zedong, Kaj Vang Juĉang parolas pri la sperto sia: "Memoru bone l'vortojn de la Prezidanto, Kaj ĉiam ardos via kor' revolucia."



Unu Neordinara Paktuko

LA Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiun Prezidanto Maŭ persone fondis, estas armeo tutkore kaj tutanime servanta al la popolo.

Prezidanto Maŭ ĉiam instruas al ni: “La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank’ al ilia apogo.” La Ĉina Popola Liberiga Armeo estas armeo, kiu posedas altajn revoluciajn organizitecon kaj disciplinitecon. La rilato inter ĝi kaj la tutlanda popolo similas al tiu inter fiŝo kaj akvo; ĝi devenas el la popolo kaj servas al kaj batalas por la bazaj interesoj de la ĉina popolo kaj la tutmonda popolo.

Nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktlisto Prezidanto Maŭ jam postulis en la komenciĝa periodo de la Ruĝa Armeo, ke en kontakto kun la amaso, la armeanoj devas paroli afable, aĉeti kaj vendi juste, ne laborigi perforte, nek bati aŭ insulti polanojn. Dum la printempo kaj somero de 1928, kiam la Laborist-Kampana Ruĝa Armeo estas sur Gingsang-montaro, Prezidanto Maŭ denove difinis persone por ĝi “tri regulojn de disciplino kaj ses punktojn de atentigo”, kiuj poste disvolviĝis en “tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atentigo” post pluapaŝa kompletigo.

La tri ĉefaj reguloj de disciplino, kiujn la Ĉina Popola Liberiga Armeo nun plenumas, estas: “Unue, obeu ordonojn en ĉiuj viaj agoj; due, ne prenu de la amasoj eĉ kudrilon aŭ fadenon; kaj trie, elliveru ĉion militkaptitan. La ok punktoj de atentigo estas: parolu afable; aĉetu kaj vendu juste; redonu ĉion prunteprenitan; pagu por ĉio de vi difektita; ne batu aŭ insultu; ne damaĝu plantaĵojn; ne flirtu kun virinoj; kaj ne malbontraktu militkaptitojn.

La disciplino de la Laborist-Kampana Ruĝa Armeo difinita de kamarado Maŭ Zedong, estis siatempe ĉefa enhavo de la politika laboro en la Ruĝa Armeo. Antaŭ pli ol 30 jaroj, kiam ruĝaj armeanoj legis la revoluciajn disciplinajn regulojn difinitajn de Prezidanto Maŭ, ili ĉiuj estis inspiritaj kaj konkure plenumis ilin. Iuj batalantoj transskribis ilin sur siaj paktukoj, kiujn ili dorsportis dum marŝado kaj pendigis sur muro, kiam ili restis en garnizonejo. Ili ĉiam plenumis ilin kiel plej altan direktivon kaj disciplinon, kaj propagandis ilin.

Tiu ĉi paktuko estis uzata de iu tiama ruĝa armeano sur Gingsang-montaro. Sur ĝi estas registrita la revolucia fakto kun historia signifo, ke ruĝaj armeanoj la unuaj plenumis la “tri ĉefajn regulojn de disciplino kaj ok punktojn de atentigo”.

Dum la lastaj pli ol 30 jaroj, la penso de arma konstruado de Prezidanto Maŭ havis novan gravan disvolvon en la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

En la lastaj jaroj, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, sub la rekta gvido de kamarado Lin Biaŭ, levis altan tajdon de aktiva studo kaj aktiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la tuta armeo; tio forte antaŭenpuŝis la konstruadon kaj pluan revoluciigon de la armeo kaj faris la armeon granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong.



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (108) 1967

Ĉefa Enhavo

- Antaŭparolo al la Dua Eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*
- Studi kaj Apliki la Vortojn de Prezidanto Maŭ
- Revolucia Popolo Ŝatas la Trezoran Libron
- Trezoraj Libroj Grandnombre Disvendataj tra la Tuta Mondo
- La Pola kaj Rumana Popoloj Arde Amas Prezidanton Maŭ
- Fremdlandaj Amikoj Varme Laŭdas la Ĉinajn Ruĝajn Gvardianojn
- Vizito al la Flava Rivero dum Neĝado
- Vortoj de Prezidanto Maŭ Lumigas Mian Koron
- Eternas la Revolucia Juneco
- Porti Medikamentan Keston por Komunumanoj
- Servi al la Popoloj de Azio kaj Afriko Kiel Bethune
- Ĝojigaj Novaĵoj sur la Industria Fronto de Ĉinio
- Prospere Floras Higoŭ-brigado
- Batalo sur la Bak Bo Golfo
- Ĉiam pli Ardas la Fajrego de Armita Batalo de la Tajlanda Popolo
- Du Popolaj Kantoj
- La Ministerio de Nacidefendo Honore Titolis Vang Juĉang Modela Soldatamanto
- Sur la kovrilo* — Kiu Hong (6-jara), Propagandistino de la Penso de Maŭ Zedong
- Sur la dorskovrilo* — Somera Paŝejo en Hulunbujer-ligo, Interna Mongolio

**Artaj Batalantoj
de Maŭ Zedong,
Tutkore
Servantaj
al la Popolo de
la Tuta Mondo**



La Ĉina Akrobata Arto-trupo faras prezentadon por nepalaj laboruloj en montregiono kaj ricevas de ili varman bonvenigon.

Membroj de la Ĉina Ensemblo de Popolaj Kantoj kaj Dancoj kantas por popoloj de Gaza la palestinan militan kanton *Ni Nepre Revenos al la Hejmloko*.



